


EL POPOLA ĈINIO

中國報道


3 1982



EN LAHULA VILAĜO




Vilaĝo de lahu-oj




Lahu-a knabino

Fotoj de QU WEIBO

Lahu-nacieco havas 270.000 membrojn, kiuj vivas en montregiono en la baseno de Lancang-rivero en Yunnan-provinco de Ĉinio. Iliaj prapatroj vivis ĉefe el ĉasado, kaj ankaŭ hodiaŭ la viroj havas pafilon kaj pafarkon por ĉasi en vintro. La virinoj estas lertaj en teksado kaj brodado. Ili estas vestitaj per longaj roboj borderitaj per buntaj tolpecoj kun geometriaj figuroj kaj arĝentaj ornamaĵoj ĉe la kolumo kaj ambaŭ baskoj. Kaj pli-ol-tri-metra kaptuko pendas ĝis la talio. En festotagoj aŭ libera tempo, la gejunuloj kolektiĝas surmonte, kie ili bruligas kampfajron kaj kantas amkan-ton, eĉ ĝis la sekvanta mateno.



Senŝeligo de rizo



En rikoltaj tagoj

Kantado ĉe kampfajro





Antaŭ kamplaboro



Lernado de pafo

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio

SUR LA KOVRILO:

Blovi per folio. La junulino de lahu-nacieco de Ĉinio tre ŝatas ludi belan melodion per folio por esprimi sian amon al junulo.

Foto de **QU WEIBO**

SUR LA DORSKOVRILO:

Poplo

Akvarelo de **YU REN**

KOLORAJ SERIOJ:

En lahu-a vilaĝo

Pejzaĝoj de Xiandu

Fotoj pri naturaj belaĵoj faritaj de E-istoj

Frikasitaj salikokoj

Ĉinaj akrobataĵoj

Nova fizionomio de Xi'an (3)

NIGRAJ-BLANKAJ SERIOJ:

Hao Jianxiu, ministro deveninta de ŝpinistino

Energi-ŝpara akvoturbina pumpilo

Fišado sub glacio

Ĉina entomologo prof. Io Chou

Enhavo

La virinoj de Ĉinio	2
Post kiam ŝi fariĝis ministro	4
MIA VIVO: Mi amas mian flegistinan laboron	6
La bonhava vilaĝo	9
SUR NIA LIBROBRETO: Songo en tago	11
Mebla industrio en Ĉinio	12
La Esperanto-movado en Ĉinio (2)	14
NIA KULTIVEJO: Gastamaj hispanaj esperantistoj	17
ESP-NOVAĴOJ	19,41
Vojaĝo en la hejmloko de Konfuceo	21
VIDINDAJ LOKOJ: Turismo en Xiandu	25
ĈINAJ PLADOJ: Frikasitaj salikokoj	25
Gejunuloj de la filharmonio Zhongsheng	26
Prof. Zhong Huilan — specialisto pri tropikaj malsanoj	28
AMIKECO	31
EN LA REGIONOJ DE NACIMALPLIMULTOJ: Ĝenro pri la evenkoj	33
Sepstela kolĉeno (Novelo)	35
5000 JAROJ DE ĈINIO: Fondiĝo de la sklavsistema ŝtato	38
Ankoraŭ ekzistas en la mondo diskriminacio kontraŭ virinoj	42
INTER NI: Pri la ĉina eduksistemo	43
KURANTAJ AFEROJ	44
TRA LA MONDO	46
Ŝtelado de kapro	48

—◆—
Ĝenerala distribuanto: Esperanta Sekcio de Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj (GUOJI SHUDIAN)
P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

La virinoj de Ĉinio

KARAJ amikoj, se vi vizitos Ĉinion, eble vi unue kontaktiĝos kun ridetantaj doganistinoj; se vi veturos per trajno, eble vi ricevos servon de konduktorinoj; se vi volos taksion, la ŝoforo eble estos junulino; se vi vizitos tekstilan fabrikan, vi vidos, ke tieaj laboroj plejparte estas plenumitaj de virinoj, kaj eble ĝia estro estas virino. . .

En Ĉinio oni figure komparas la virinojn kun "duonĉielo", ĉar ili konsistigas duonon de la loĝantaro de la tuta lando, kaj


krome ili ludas pli kaj pli gravan rolon sur diversaj postenoj same kiel la viroj.

En la konstruado de la unua granda baraĵo Gezhouba de Jangzi-rivero partoprenis pli ol 12,000 virinoj. Je la 16-a de decembro 1970, aŭskultinte la raporton pri la konstruo de la baraĵo, ĉefministro Ĝou Enlaj alte laŭdis ĝiajn konstruantiinojn. En la konstruejo virinoj okupiĝis pri scienca esplorado, projektado, administrado, kontrolo de kvalito kaj diversaj ser-

voj. Ekzemple ses knabinoj kaj dek laboristoj estis taskitaj veldi la malsupran A-forman pordon de la ŝipkluzo ĉambro de la baraĵo. Ĉiu klapo de la pordo pezas 600 tunojn kaj devis esti veldita kun vertikala ekarto de malpli ol 5 milimetroj. Tio ja estis malfacilega tasko. Sed ili bone plenumis ĝin dank' al la kuna klopodo. Juna laboristino Zhou Richu, kiu venis al la konstruejo en majo de 1976, finlegis diversajn verkojn pri velda teknologio kaj skribis multajn notojn pri veldo. En la praktiko ŝi trovis leĝon pri veldo de ŝtalstangetoj. Ŝi ĉiam plenumas 2-3-oble taskon difinitan de la ŝtato kun bona kvalito. Pro tio la konstrua buroo de la baraĵo premiis ŝin per speciala honoro kaj ŝi estis elektita de la Akvomastroma Ministerio kiel labormodelo.

La ĉinaj virinoj estas granda homforto. Nun ĉ. 34 milionoj da virinoj laboras en la entreprenoj de industrio, trafiko, financo, komerco, higieno, medicino, eduko, scienco kaj tekniko kaj konsistigas 34% de la totala nombro de la laboristoj kaj oficistoj. En la ŝpinteksaj kaj malpezaj entreprenoj virinoj konsistigas 60-65% de la totala nombro de la laboristoj kaj oficistoj. Sed en 1955 laboristinoj kaj oficistinoj konsistigis nur

Prof. Chen Ruyu (dekstre) de la Instituto pri Organika Kemio sub Nankai-universitato, Tianjin, en esplorado de nova insekticido




14% de la totala nombro de la laboristaro. Antaŭ la Liberiĝo la ĉinaj virinoj plejparte povis fari nur dommastrumadon. Kompare kun tio la nuna nombro de laborantaj virinoj montris specialan signifon. Nun pli kaj pli multe da virinoj okupiĝas pri aviado, metalurgio, mineral-ekspluatado kaj prospektorado, kiujn oni antaŭe rigardis nefareblaj por la virinoj. En tiuj laboroj ili povas plene disvolvisian talenton kiel la viroj.

En la vasta kamparo de Ĉinio troviĝas ĉ. 150 milionoj da laborpovaj virinoj. Ili ludas gravan rolon en terkulturo, forstumado, brutobredado, flankokupoj, fiŝado k.a. En 1980 Ĉinio akiris bonan rikolton de agrikulturo malgraŭ seriozaj naturaj katastrofoj. Kvankam grena produktokvanto iom malaltiĝis kompare kun tiu de 1979, tamen ĝi ankoraŭ estis la dua altprodukta jaro en la pasintaj 30 jaroj. La totala kotona produktokvanto de 1980 atingis la plej altan rekordon en la historio. Ankaŭ oleaj, sukeraĵoj kaj aliaj ekonomiaj plantoj grandnombre pliproduktiĝis. Tiuj sukcesoj estis neapartigeblaj de la diligentaj virinoj en la kamparo.

Krome la virinoj en la kamparo okupiĝas pri bredado de silkaj raŭpoj, fiŝoj kaj dombestoj, kulturado de tearboj, fruktarboj kaj drogherboj, prilaboro de manĝaĵoj k.a. En multaj lokoj virinoj lertas en brodado kaj produktas tradiciajn vivbezonojn kaj metiartaĵojn uzante tieajn materialojn kiel fragmito, herbo, salikaj vergetoj, bambuo, liano, palmaj fibroj k.a. Tiuj produktadoj havas debiton ne nur en la enlanda merkato, sed ankaŭ en tiu internacia, kaj estas

Kuracisto Li Hongrong de la hospitalo de la komunumo Hanmiao, Shanghegubernio, Shandong-provinco, rehavigis vidkapablon al 95 pacientoj per sia lerta kuracarto.



tre ŝatataj de diverslandaj amikoj.

Praktiko pruvis, ke tion, kion la viroj povas fari, ankaŭ la virinoj povas. Ekzemple en scienca esploro, same kiel viroj, virinoj montris siajn saĝon kaj talenton. Nuntempe en Ĉinio estas pli ol 80,000 sciencistinoj, kiuj konsistigas 27% de la totala nombro de la sciencaj laborantoj. Ili estas vigla forto de la ĉina scienca esplora rondo kaj ludas ĉiam pli gravan rolon en disvolvo de scienca afero, organizado kaj gvido de scienca es-

ploro kaj kulturado de sciencaj laborantoj. En la Ĉina Akademio de Sciencoj troviĝas 270 esploristinoj, vicesploristinoj kaj 4,870 asistaj esploristinoj. Inter ili 15 eminentaj sciencistinoj estas elektitaj kiel membroj de la Ĉina Akademio de Sciencoj. Ili senĉese faras novan kontribuon en fiziko, kemio, matematiko, biologio, geologio kaj teknika scienco.

Mezaĝa sciencistino Wu Xiaoping estas la unua ĉina virino, kiu ascendis sur la internacian podion de eksperimenta mehani-

ko. En 1974 Wu Xiaoping kaj sia kolego ricevis sciencesploran temon urĝe solvendan por produktado: kiel precize mezuri deformiĝon de solida materialo kaj strukturo sub premo. Wu Xiaoping diris: "Kiel ajn granda la malfacilo estos, oni nepre trovos ĝian solvon post multa cerbumado." Ŝi kaj la kolegoj faris centojn da eksperimentoj en 7-8 jaroj kaj fine akiris ĝojindajn sukcesojn. Inter ili iuj atingis enlandan avangardan nivelon ĉu teorie ĉu praktike. Tiuj fruktoj povas esti aplikataj en aviado, astronautiko kaj fabrikado de precizaj maŝinoj. En majo de 1980 Wu Xiaoping ĉeestis la Kvaran Internacian Konferencon de Eksperimenta Meĥaniko en Bostono de Usono, kie ŝi voĉlegis disertaĵon pri lummezura meĥaniko kaj prezentis formulon pri nova movado. Tio vekis grandan atenton de pli ol 200 sciencistoj el diversaj lokoj de la mondo.

En la kultura kaj eduka rondoj, triono de la instruistoj en la mez- kaj element-lernejoj estas virinoj, kaj krome en Ĉinio estas centmiloj da gubernistinoj. En la altaj lernejoj 26% de la docentoj kaj profesoroj estas virinoj.

Liao Fengling, 80-jara instruistino de la Normala Lernejo de Kantono, devenis de instruista familio. Ŝi havas 9 gefratojn, inter kiuj 7 estas instruistoj aŭ rektoroj. Ŝi laboris kiel instruisto jam 50 jarojn. Ŝiaj lernantoj troviĝas ĉie tra Ĉinio. Inter ili estas instruistoj, sciencistoj, sportistoj, kuracistoj kaj ĵurnalistoj. Kvankam Liao Fengling estas jam grandaĝa, tamen ŝi diris, ke ŝi laboros ĝis la lasta spiro por dediĉi sian tutan vivon al la eduka afero de la patrolando.

HONG YING:

Post kiam ŝi fariĝis

ministro


NIAJ legantoj eble ankoraŭ memoras la ĉinan faman labormodelon Hao Jianxiu, prezentitan en la artikolo "Antaŭe Ŝpinteksistino, Nun Vicministino" en n-ro 7, 1978. Pro sia elstara laborado en la pasintaj tri jaroj, ŝi estis nomumita estro de la Ministerio de Tekstila Industrio en marto 1981. Nun ŝi gvidas 5,000 tekstilajn entreprenojn kun 3.4 milionoj da laboristoj kaj oficistoj.

La 46-jara Hao Jianxiu estas la plej juna ministro en la ĉina registaro. Ŝi naskiĝis en malriĉa familio kaj kolektis karborubojn en sia infaneco. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949, ŝi fariĝis ŝpinistino en la Sesa Ŝtata Ŝpinteksa Fabriko de Qingdao. Dank' al sia diligenta studo pri teknologio kaj modesta lerno de veteranaj laboristoj, ŝi kreis "Labormetodon de Hao Jianxiu" en somero, 1951. La disvastigo de la labormetodo multe akcelis la produktadon de la tekstila industrio. Tiam ŝi estis nur 15-jara. Poste ŝi estis elektita kiel tutlanda labormodelo de la tekstila branĉo kaj reprezentanto de la Tutlanda Popola Kongreso. Por kulturi ŝin koncerna instanco sendis ŝin en

1954 al laborista-kampana mezlernejo kaj poste al la Orientĉinia Tekstila Instituto en Ŝanhajo, por ke ŝi tie sin klerigu kaj lernu fakan teorion scion. Fininte sian lernadon en 1962, ŝi revenis al Qingdao kaj laboris en sia antaŭa fabriko kiel teknikistino kaj vicfabrikestrino. En la komenco de 1978 ŝi estis nomumita vicministro de la Tekstila Ministerio.

Post kiam Hao Jianxiu fariĝis vicministro, ŝi uzis trionon de sia labortempo por fari enketon. Dum la tri jaroj ŝi trairis du trionojn de la provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj de Ĉinio kaj inspektis multajn tekstilajn fabrikojn. En 1978 ŝi kaj aliaj du vicministroj, kun laborgrupo sub sia gvido, venis al la Ŝanhaja Tekstila Buroo por fari enketon. Escepte de ĉeesto de necesaj kunvenoj, ŝi ĉiam restis kun laboristoj en produktado por studi kune kun ili teknikojn kaj resumi sperton.

Por informiĝi pri la situo de tekstilaj entreprenoj, la provizado de krudmaterialoj, produktiveco de diversaj lokoj, kvalito de produktaĵoj kaj administrado de entreprenoj, ŝi multfoje vetu-



Hao Jianxiu kaj ŝiaj edzo kaj gefiloj

ris al malproksimaj provincoj por fari enketadon. Foje ŝi ĉestis teknikan demonstradon de ŝpinteksistinoj en Tianjin kun la celo kuraĝigi laboristojn en studo de tekniko. Vidinte ke ŝi, post multjara forlaso de produktado, restas ankoraŭ tre lerta en maŝinmanipulado, la ŝpinistinoj ĝoje diris: "Ni neniam vidis ministron, kiu scipovas ŝpini."

En la pasintaj du jaroj bona situacio malofte vidita post la fondiĝo de la nova Ĉinio aperis en la ĉina tekstila industrio. En 1979 kaj 1980 la totala produktovaloro de la tekstila industrio kreskis je 19.8% ĉiujare, la kvalito de ĝiaj ĉefaj produktaĵoj atingis la plej bonan nivelon en la historio, senĉese noviĝis ĝiaj specoj kaj rimarkinde pliboniĝis la provizado de teksaĵoj en la merkatoj de la urboj kaj kamparo.

Kiel ministro de la Ministerio de Tekstila Industrio Hao Jianxiu ne kontentiĝis pri tio. Ŝi ofte iris al bazaj unuoj por helpi ilin ĝustatempe solvi proble-

mojn en la produktado. Inspektante Yunnan dense loĝatan de nacimalplimulto, ŝi trovis, ke diversaj ornamaj desegnoj sur vestoj kaj jupeoj de tieaj nacimalplimultaj virinoj estas tre belaj, sed ties farado temporaba. Ŝi do proponis, ke la Teksejo de Kunming pogrande produktu orfadenan ŝtofon por tubojupo, kaj inspiris la laboristojn tutkore servi al la nacimalplimultoj. Kaj poste ankaŭ la tekstila industrio de Xinjiang, Jilin, Tibeto, Yunnan, Guizhou kaj Guangxi produktis novajn specojn ŝatatajn de la nacimalplimulto.

En la lasta tagdeko de oktobro 1981 Hao Jianxiu diris en la Teknikinterŝanĝa Kunveno por Junaj Ŝpinteksistinoj okazigita de la Ministerio de Tekstila Industrio, ke estas necese levi amasan movadon por studo kaj interŝanĝo de tekniko kaj ekzerco de maŝinmanipulado por certigi stabilan disvolviĝon de la tekstila industrio kaj pligrandigi la ekonomian profiton. En la kunveno ŝi laŭdis 126 junajn

ŝpinteksistinojn kaj aliajn 45 speciale invititajn ŝpinteksistinojn kaj donis al ili honoran diplomon.

Hao Jianxiu laboras tre diligente kaj gajnis multajn sukcesojn, sed vivas tre modeste. Post kiam ŝi fariĝis ministro, ŝi loĝas daŭre en apartamento por ordinara civitano. Ĉiutage ŝi veturas al la laboro per aŭtobuso kune kun amasoj de la ministerio kaj ĉiam cedas sidlokon al maljunaj kamaradoj, kaj pro tio oni intime nomas ŝin "pleba ministro".

Aŭdinte tion ŝi ĉiam diras: "Mi mem estis ordinara laboristino!"

Hejme Hao Jianxiu estas ordinara mastrino. Kiam venas gastoj, ŝi tuj ĉesas labori kaj afable regalas ilin per teo. Iam gastoj ŝerce diris: "Ni mem nin regalu por ne ĝeni vian ministran moŝton." En tiaj okazoj ŝia edzo ĉiam diris ridante: "Lasu ŝin fari, hejme ŝi ne estas ministro kaj faras ĉion inkluzive de preparado de manĝaĵoj, vestolavado, ordigo de ĉambroj kaj eduko de la infanoj."

Hao Jianxiu havas feliĉan familion. Ŝia filino lernas en la dua klaso kaj ŝia filo en la unua klaso en elementa mezlernejo. Ŝia edzo Qiang Ruichun estas kuracisto, kiu nun perfektigas sian scion de fremda lingvo en altlernejo. Hejme li ofte ŝerce nomas sian edzinon "Glacia Bloko". Kiam ŝi studis en Ŝanhaja altlernejo, nemalmultaj junuloj enamiĝis al ŝi, sed ŝi ĉiam diris: "Ankoraŭ juna mi estas kaj la lernado estas peniga, tial mi ne volas pensi pri amafero antaŭ la diplomitiĝo." Pro tio ŝiaj kunlernantoj donis al ŝi kromnomon "Glacia Bloko".



Mi amas mian flegistinan laboron

de JI SHU'E



Ji Shu'e kaj ŝia edzo Li Shengfan

La aŭtoro estas 43-jara flegistino kun bona faka scio kaj riĉa klinika sperto. Ŝi laboras en Gulou-hospitalo de Nankino (Nanjing), la ĉefurbo de la provinco Jiangsu. De multaj jaroj, ŝi traktas la pacientojn kiel siajn parencojn kaj ĝuas ties profundan respekton. Ŝi diplomitiĝis el flegistina lernejo. Ŝia edzo Li Shengfan, pli aĝa ol ŝi je unu jaro, estas ĉefkuracisto de la brulvunda sekcio de la sama hospitalo. La geedza paro havas 13-jaran filinon kaj 12-jaran filon kaj loĝas en la loĝejo de la hospitalo.

— La Red.

Mi laboris kiel flegistino jam 21 jarojn. Mi profunde konsciis, ke laboro de flegistino estas kaj sankta kaj glora.

Mi neniam forgesos, ke en la jaro post mia diplomitiĝo kaj surpaŝo sur la laborpostenon, iu

enhospitaliĝinta studento demandis min: “Kial vi okupiĝas pri tiu profesio? Vi ja estas juna, saĝa kaj movorapida.” Evidente lia paroltono entenas bedaŭron.

Laŭ li laboro de flegistino

estas bagatela kaj bezonas nenian fakan scion. Kun rideto mi respondis: “Kiu flegas vin, malsanulojn, se neniu volas okupiĝi pri tiu laboro?”

“Do lasu tion al familianoj de la pacientoj.”

La “Glacia Bloko” degelis fine post kiam ŝi diplomitiĝis. Ŝi akceptis la edziĝproponon de Qiang Ruichun kaj ili geedziĝis en 1965. Aspekto hontema kuracisto Qiang humure diris: “Kiam mi studis en la Dua Medicina Instituto de Ŝanhajo, mi

funkciis kiel vicprezidanto de la loka studenta federacio kaj estis ŝia superulo, sed mi ne montris fierecon nek havis arogantecon de viro.” Tiam Hao intermetis: “Jes, Qiang ne havas ‘dignon’ de viro. Kiam mi veturas aliloken pro laboro, li devas prizorgi

ĉiujn hejmlaborojn kaj niajn infanojn. Li estas tre okupata, sed ofte studas ĝis profunda nokto. Ankaŭ mi ne rajtas malestimlin pro tio, ke mi estas ministro. Ni respektas unu la alian kaj dividas inter ni la hejmlaborojn.”

“Ili povas aranĝi la litajojn, trinkigi kaj manĝigi malsanulon. Tamen ili ne scias kiel evitigi lit-ulceron al longe kuŝanta paciento, ili ankaŭ ne scias kiel instrui la operaciitojn tusi, spiri kaj kraĉi por eviti komplikajn malsanojn. Ili des pli ne scias kiel uzi la modernajn precizajn instrumentojn observajn kaj flegajn.”

Poste li embarase ridis kaj kapjesis. Estas vere, ke kvalifikita flegistino devas havi ne nur spiriton savi mortantojn kaj helpi vunditojn, sed ankaŭ sisteman fakan scion kaj lertan teknikon. Ne ĉiu ajn povas fariĝi tia homo.

Kompreneble, ankaŭ mi ne estas denaske tia homo. Kiam mi min registris por eniri la flegistan lernejon en 1958, mi pensis ke la flegistino, tute en blanko, aspektas pura kaj gracia. Mi aliopiniis nur post kiam mi eklernis en la lernejo. Tiam mi eksciis, ke la flegistina laboro estas kaj malpura kaj laciga, kio min embarasis kaj afliktis. Kvankam la trijara studo iom levis mian laborkoncion, tamen al mi mankis sufiĉa fervoro. Mi fervoriĝis nur tiam, kiam mi kontaktiĝis kun la pacientoj en mia praktiko.

Por mi plej neforgesebla estas la flegado al iu maljunulino post galvezika operacio. Por ke ŝin ne trafu lit-ulceron, mi turnis ŝin en la lito kaj masaĝis por ŝi la premitan parton ĉiutage je la regula horo. Kiam ŝi povis ellitiĝi, mi ofte helpis ŝin promeni subtenante ŝin sub la brako. Ĉio ĉi estis laboro ordinara kaj farena. Kiam ŝi elhospitaliĝis, kun larmoj en la okuloj ŝi longe tenis miajn manojn. Ankaŭ ŝiaj familianoj esprimis al mi dankon. Eĉ ŝiaj samĉambraj mal-



Ji Shu'e en malsanula ĉambro

sanuloj direktis al mi respektan rigardon. En tiu momento varma fluo trakuris min de la kapo ĝis la piedoj. Unuafoje mi sentis la ĝojon alportitan de tio, ke la paciento resaniĝis per miaj diligentaj laboroj. Ĝuste de tiu tago mi ekhavis novan komprenon pri la flegistina laboro.

Mi laboris sinsekve en la operaciejo kaj kirurgia sekcio de Gulou-hospitalo, kiu estis kristanisma hospitalo fondita de usonanoj en 1892. Ĝi antaŭe havis nur 160 malsanulajn litojn, sed nun ĝi jam ampleksas 600 malsanulajn litojn kaj 30 sekciojn kun 260 kuracistoj kaj 300 flegistinoj. Ĝi estas la plej granda hospitalo en Nankino kaj situas en la trafika centro de la urbo. Ĉiutage ĝin vizitas meznombre 3,000 homoj kaj ĉiutage la enhospitalaj pacientoj atingis 14,000 homojn. La kirurgia sekcio, kie mi laboras, estas la plej okupata en la tuta hospitalo. Ĝiaj 60 malsanulaj litoj ofte ne povas kontentigi la bezonon.

Ĉiutage mi ordigas la litajaron, injektas, disdonas medikamentojn, transfuzas sangon, kaj krome mi ofte babilas kun la pacientoj. Mi trovis, ke multaj el la pacientoj deprimiĝas kaj ofte malpacientiĝas pro longa malsaniĝo. Tiaokaze afabla interparolo de flegistino kun ili ofte povas moderigi ilian ĉagrenon. Iu el ili diris: “Via serena rideto kaj eĉ via apero povas malpezigi mian suferon.”

Ordinare mi, samkiel aliaj kamaradinoj, tre atente observas ĉiun ajn ŝanĝiĝon de la pacientoj, faras analizon kaj juĝon por helpi la kuracistojn en kuracado. Foje, kiam mi havis noktan deĵoron, mi trovis, ke iu instruisto de gastroektomio kuŝas ne plu surdorse, sed sur sia maldekstra flanko. Mi senbrue iris al li kaj trovis post atenta observo, ke liaj vangoj estas ruĝaj kaj li tre maltrankviliĝas. Mi tuj venigis la deĵorantan kuraciston. Post ekzameno li konstatis, ke li suferas sangadon de kapilaraj angioj;



Ji Shu'e en interparolo kun pacientoj

kaj faris al li duafojan operacion. Rimarkinte la kontentan rideton de la kuracisto kaj trankvilon sur la vizaĝo de la operaciito, mi sentis ekstreman ĝojon, kaj min tuj forlasis la laco.

Fleglaboro estis rigardata kiel malnobla okupo en la malnova Ĉinio. Tiam la flegistinojn ĉiam minacis maldungo pro edziniĝo kaj malsaniĝo.

Nun la cirkonstancoj ŝanĝiĝis radikale. Nia socia pozicio plialtiĝis multe. La 22-a de majo estas Internacia Flegistina Tago kaj la tago, en kiu la "blank-vestaj anĝeloj de la tuta mondo memoras la anglan flegistinon Florance Nihtingale, kiu sin oferis por flega scienco. Antaŭvespere de la Internacia Flegistina Tago de 1981, la Ĉina Flegistina Asocio kunvokis kunsidon en Pekino, ĉe kiu parolis kamaradino Deng Yingchao, honora prezidanto de la asocio, kaj kamaradino Kang Keqing, prezidanto de la Ĉina Virina Federacio. Ankaŭ la flegistinoj kaj urbaj gvidantoj de nia urbo ĝoje


ĉeestis festkunvenon kaj rigardis filmojn. Hodiaŭ ankaŭ ni, flegistinoj, havas ŝancon esplori kaj studi eksterlande. Ĉiu, kies faka scio atingas difinitan nivelon, povas esti promociita. En la pasinta jaro mi partoprenis la ekzamenon por promociado kaj akiris ĝojindajn poentojn en baza medicino, kirurgio kaj kirurga flegado kaj por mia disertajo. Sankciite de la Ministerio pri Higieno, mi estis promociita al kuracisto-flegistino.

Mia progreso en la faka scio estas nedisigebla de la simpatio

kaj helpo de mia edzo, kiu diplomitiĝis el la Medicina Instituto de Nantong en 1965. Nun li estas mia kolego en la sama sekcio de la sama hospitalo. Li ĉiam volonte kaj pacience respondas al miaj demandoj kaj iafoje eĉ elmetas demandojn por diskuti kun mi. Malgraŭ sia okupateco en la kuracado li ĉiam memvole partoprenas mastrumadon — aĉetas almanĝaĵojn, grenon kaj hejtajon. Se la tempo permesas, li ankaŭ helpas min pretigi manĝaĵojn kaj lavi vestojn, por ke mi havu pli da tempo por legi medicinajn materialojn. Kiam mi partoprenas la fakan konkurson, li ĉiam ĵetas al mi kuraĝigajn rigardojn el la rigardanta amaso kaj mi ofte reakiras forton el liaj profundaj kaj brilaj okuloj.

En la lastaj jaroj venis en nian sekcion aro da junaj flegistinoj por studi kaj praktiki. Ni mezaĝaj kaj maljunaj flegistinoj estis komisiitaj ilin kulturi. Pasintjare ni faris instruan praktikon pri dekkelkaj malsanoj. Dank' al diligenta studo ili akiris ĝojigan sukceson en flegado. Ilia progreso en la laboro min ĝojigis multe. Mi decidis havigi al niaj junaj flegistinoj ĉion, kion mi scias.

Ji Shu'e helpas junajn flegistinojn.





Novaj domoj de kamparanoj en antaŭurbo de Ŝanhajo

La Bonhava Vilaĝo

— Vizito al la produkta taĉmento Shenjiazhai en antaŭurbo de Ŝanhajo

de LIN GANG

LA kamparanoj antaŭ ĉio konstruas por si domon, se ili havas monon. Ĉirkaŭ 90 procentoj de la familioj en la brigado Shenjiazhai jam konstruis por si novajn domojn kun nigra-tegolaj tegmentoj kaj blankaj muroj. Antaŭ ĉiu domo sterniĝas sunumejo kaj la etaĝdomoj havas balkonojn. Ĉiu ĉambro plenas je sunradioj kaj freŝa aero. La domoj prenis pli kaj pli modernajn formojn kaj la ĉambroj estas grandaj: la loĝejo de ĉiu vilaĝano okupas meznombro 30 kvadratajn metrojn, kion envias eĉ la urbanoj. Ĉiu familio jam havas televidilon, kudromaŝinon kaj meznombro du biciklojn. Multaj familioj havas sofon, murlampon, starventumilon, stereofonian magnetofon-radioricevilon kaj bonkvallitan lignan meblaron. . .

Shenjiazhai, kie vivas 234 loĝantoj, troviĝas en la popola komunumo Xinjing kaj estas nomata bonhava vilaĝo. Ĝi estas unu el la produktaj taĉmentoj en la kamparo de Ŝanhajo, kiuj riĉiĝis en la lastaj jaroj. En

1980 la totala produktovaloro de agrikulturo, brutobredado kaj flankaj okupoj atingis 730 mil juanojn, kaj meznombro por ĉiu loĝanto estis pli ol 3,100 juanoj, egale al 1,950 usonaj dolaroj.

“Kiamaniere vi riĉiĝis?” ĉiu vizitanto demandas.

“La riĉiĝo devenas de la kampoj kaj la forcejoj,” ĉiam respondas taĉmentestro Shen Qiming.

En la antaŭurbo de Ŝanhajo la agraro estas malmulta, sed la loĝantoj multaj. Malgraŭ ke la legomoj estas altvaloraj ĝenerale, nura plantado de ili ne riĉigas la kamparanojn. Por kultivi la 10-hektaran legomkampon sufiĉas 70 laboruloj. Sed pri kio sin okupas la ceteraj laboruloj? Shen foje kaj refoje interkonsiliĝis kun siaj komunumanoj kaj venis al la decido bredi kokojn, anasojn kaj porkojn. Li profunde pensis, ke la dek milionoj da ŝanhajanoj bezonas viandon kaj kun la daŭra leviĝo de la vivnivelo ili bezonos pli kaj pli multe. Konfirminte tion, li do decidis sin ĵeti en tiun okupon.

Tial la produkta taĉmento pli kaj pli prosperiĝas kaj ĝia ekonomia bazo fariĝis pli kaj pli solida.

La tieaj porkejoj aspektas simplaj, sed en ili regas granda pureco. La estro de la 12-bredista grupo konigis al mi, ke la hibridaj porkoj kreskas rapide kaj la viando konsistigas 73 procentojn de la tuta korpopezo. En 1981 ili forvendis dumil porkojn al la ŝtato.

En la taĉmento estas du kokobredejoj. Unu el ili kuŝas de oriente al okcidente. Ĝi estas 64 metrojn longa, bone ventolata kaj sunumata. Matene, vespere kaj en la malhelaj tagoj la bredejoj estas lumigataj per elektra lampo. La junaj bredistinoj kun bela kaptuko nutras kokojn kaj kolektas ovojn sur la speciale farita malpeza triciklo. Mi demandis, kial ili ne aŭtomatigis ovokolektadon. Unu el ili respondis, ke homa kolektado de ovoj povas redukti la damaĝon kaj helpas malkovri, kiu kokino malmulte demetas ovojn aŭ tute

ne, tiel ke oni povas ĝustatempe ilin likvidi. En la bredejoj maŝinoj estas uzataj nur en la intensa fekaĵ-forigo kaj similaj.

Por meĥanizi la bredadon Shen veturis al Kantono por viziti ŝtatajn modernajn kokobredejojn. Reveninte de tie, li cerbumadis kune kun la talentaj laborantoj kaj faris skizon respondantan al la stato de la taĉmento kaj ties ekonomia forto, petante ke fakuloj faru la koncernan projekton laŭ ilia postulo, antaŭ ol ili mem konstruos la bredejon. La unua kokobredejo finkonstruiĝis en kvar monatoj per 18 mil juanoj. Tia duonaŭtomata kaj simpla bredejo kun scienca ekipaĵo povas doni bonan ekonomian efikon kaj en la ceteraj monatoj de la jaro post la finkonstruo oni jam akiris profiton egalan al 74 procentoj de la investo.

La staplo de la taĉmento havas simplan strukturon kaj grandan kapaciton. Ne estas malfacile por ĝi enteni cent

mil aŭ ducent mil kilogramojn da nutraĵoj. Ĉar la kortobirdoj kaj brutoj bezonas malsamajn nutraĵojn en malsamaj stadioj de sia kresko, tial oni devas fari diversajn nutraĵojn por kontentigi ilian bezonon. Mi vidis, ke sur muro pendas nigra tabulego, sur kiu estas skribitaj la porcioj de fiŝpulvoro, silkraŭpaj krizalidoj, rekrementoĵoj el arakidoj, maizgrajnoj, grio, brano, konkopulvoro kaj similaj en la miksnutraĵoj. Lerninte la sperton de la avangardaj kokobredejoj la taĉmento Shenjiazhai speciale asignis ses homojn al la laboroj koncerne la nutraĵojn bezonatajn de la kortobirdoj, inkluzive de aĉetado, transportado, staplado, ellaborado kaj liverado.

La taĉmento forvendas al la ŝtato ĉiujn siajn superproduktajn porkojn, kortobirdojn kaj ovojn. La nuna politiko permesas, ke oni vendu en la bazaro la produktaĵojn ekster la normoj taskitaj de la ŝtato. Nature estas alta la prezaro. Tamen la taĉmento neniam vendis en la bazaro la produktaĵojn de la kolektivo. Ĝiaj membroj diris: "Hodiaŭ ni riĉiĝis dank' al la ŝtata helpo: prunto de la banko, teknika instruado, elkulturo de bredistoj ktp. . . Nun la ŝtato bezonas

almanĝaĵojn, tial ni volontas vendi ĉiujn produktaĵojn al ĝi."

Ambaŭflanke de la vojo etendiĝas legomkampoj zorge kulturataj. Kiam mi atingis la lokon, kelke da mezaĝaj virinoj laboris en la hela sunlumo super braskoj transportataj la sekvantan tagon, dum kelkaj aliaj riparitis la forcejkovrilon por planti travintrajn legomojn. Tie oni jam ne plu uzas vektojn. Jam aŭtomatiĝis la laboroj: kampoebenigo, irigacio, sterkado kaj protekto de la vegetaĵoj. Multe ŝanĝiĝis ankaŭ la ekonomia strukturo de la taĉmento. En 1975 la legomoj konsistigis 39 procentojn de ĝia totala enspezo, bredado 27 procentojn kaj aliaj flankaj okupoj 34 procentojn. En la pasintaj jaroj ege disvolviĝis la bredado, kiu jam konsistigis 88 procentojn de la totala produktov valoro, dum la legomoj nur 10 procentojn.

Estas menciinde, ke jaron post jaro kreskas la totala produktokvanto kaj pormerkata kvanto de legomoj de la taĉmento. Kun plena memfido la taĉmentestro diris al mi, ke estos espereble pli bona rikolto de la legomoj en la venonta jaro, kio dependos ĉefe de la du rimedoj: unue pli-

Traktoristo Shen Guanbao (dekstre)




Kokobredejo



igi la produktokvanton de kukumo, tomato, papriko kaj aliaj plantoj, kiuj rapide maturiĝas, kaj due, praktiki la respondecan sistemon asigni la produktokvanton al ĉiu. La 123-laborula taĉmento, en 1980, liveris al Ŝanhajo 792,600 kilogramojn da legomoj, 1,600 porkojn, 29,500 kortobirdojn kaj 135 mil kilogramojn da ovoj. Oni kalkulas, ke nur 400 tiaj produktaj taĉmentoj kia Ŝenĵiazhai ja povas kontentigi la bezonon de Ŝanhajo je almanĝaĵoj.

Ĉiu laborulo de la taĉmento Ŝenĵiazhai kontribuis en 1980 al la ŝtato per 6,430 kilogramoj da legomoj, 685 kilogramoj da porkaĵoj, 240 kortobirdoj kaj 1,126 kilogramoj da ovoj. La jara produktovaloro de ĉiu laborulo jam atingis 5,943 juanojn, el



Dormoĉambro de kamparano Ŝen Ŝangfei

kiuj la taĉmento devas rezervi 31 procentojn por akumulo kaj por la kolektivo (la fiksa kapitalo de la taĉmento nun estas 350 mil juanoj). Fine, ĉiu membro ricevis 1,665 juanojn

jare, t.e. 138 juanojn monate. La taĉmentestro Ŝen Qiming ricevis monate 180 juanojn en la pasinta jaro, malpli ol traktoristo Ŝen Guanbao, kiu ricevis 200 juanojn monate.

SUR NIA LIBROBRETŬ

En tiu ĉi rubriko ni aperigas recenzojn pri Esp-ajoj, kiujn la eldonistoj sendis al ni po-du-ekzemplere, kaj nur mencias tiujn ricevitaĵn po-unu-ekzemplere. Ni ankaŭ bonvenigas recenzojn faritajn de alilandaj seriozaj samideanoj kaj ilin rekompencas pro la kontribuoj per niaj Esp-aj eldonaĵoj aŭ ĉinaj metiartaĵoj. La redakcio ne prenas sur sin la respondecon pri la laŭdoj aŭ kritikoj de la recenzantoj.

LA RED.


Songŝo en tago

LA NOKTMEZA KORTUMO de Brian Merriman, el la irlandaj lingvoj tradukita de Albert Goodheir, 16 x 21 cm. 36 p. Eldonita de VULPOLIBROJ, LEEKERHOEK 26 NL-8223 ZS Lelystad, Nederlando. Prezo: 4.20 gld. plus sendkosto.

Eble vi legis verkojn de J. Swift aŭ B. Shaw, irlandaj literaturistoj, kiuj verkis en la angla lingvo, sed ĉu vi legis ion el la plumo de Brian Merriman (1757-1805), "la lasta granda poeto kiu verkis en la irlandaj lingvoj"? Lia poemo "La noktmeza kortumo" estis tiel populara en Irlando, ke "multaj analfabetaj kamparanoj sciis grandajn partojn parkere", do koniginda al la esperantistaro. Tiu rakonto en versoj prezentas al ni sonĝon en hela tago pri proceso ĉe fe-reĝina kortumo kontraŭ seksa premo kaj deviga needziĝo de klerikoj. Ĉina proverbo diras: "Kion oni pensas tage, tion oni sonĝas nokte." La sonĝo prezentita de B. Merriman kredeble spegulas lian penson pri irlandaj moroj kaj kutimoj. Certe tre malsamaj opinioj oni povas havi pri la pensoj en la poemo, ĉar tre diversaj estas la moroj kaj kutimoj de la popoloj en la mondo. Pri unu pun-

kto eble oni povas konsenti, nome la popoloj devas bone interkompreni kaj esti toleremaj unuj al aliaj por bone kunvivi en nia mondo. La tradukaĵo de A. Goodheir en klara kaj facila lingvo kaj ĝuebla formo certe helpas la legantojn en kono de la irlandaj popolo kaj ĝia literaturo. Ne sciante la originalon mi povas diri nenion pri la fideleco de la Esperanta versio. Koncerne al la lingvaĵo mi preferus, laŭ persona gusto, uzi "skribotablaj poetoj" anstataŭ la iom tro longa kunmetaĵo "skribotablopoetoj" en la 9-a linio de malsupre sur p. 3 kaj skribi "ĉifonoj de l' plandoj ĝis la kapo" anstataŭ "ĉifonoj de plandoj ĝis la kapo" en la 10-a linio de malsupre sur p. 15. La presaĵo estas plaĉa kaj senerara, kvankam la broŝuro aspektas tre modeste. Bonvena estas la kontribuo de A. Goodheir al la Esperanta literaturo.

Recenzo de LAŬLUM



HUA WEN:

Mebla industrio en Ĉinio

MEBLOFARADO estas antikva metio en Ĉinio. Dum la lastaj tridek jaroj la famaj ĉinaj meblistoj faris pliajn progresojn en la tradicia industrio.

La mebloj el malmola ligno (inkluzive palisandromeblon kaj lakomeblon) estas tradicia produktaĵo kaj havas la elstaran trajton de tradicia orienta arto. Ekzemple, kompleto da servicaj mebloj faritaj laŭ palisandromeblaj projektoj kaj ornamaj gravuraĵoj, inkluzive de tabloj, seĝoj, ŝrankoj kaj florpotaj sokloj, kun bambuaj kaj arbaj bildoj inkrustitaj per perlamotoj estas artisme produktita en Ŝanhajo. Ili vidiĝas klasikaj, graciaj kaj originalaj. Alia kompleto da mebloj por dormoĉambro farita el malmola ligno en Zhejiang-provinco, surhavas delikate gravuritajn pejzaĝajn bildojn pri la Okcidenta Lago kaj aspektas ne nur klasika, sed ankaŭ poezia. Krome, ledaj sofoj el falsa palisandro prezentas al la okuloj elegantecon kaj laŭmodecon.

La ekspozicio de mebloj okazigita de Ĉinio en aŭgusto 1980 en Hongkongo montris kompletan da mebloj, faritan de famaj metiistoj, inkluzive de lito, ŝran-

ko, tabloj kaj seĝoj. La projekto de tiuj mebloj baziĝis sur la arta formo de la mebloj en la franca kortego dum la tempo de Louis la Dekkvina en la 18-a jarcento kaj kombinis ĉi tiun formon kun la ĉina meblarto. Iliaj ĉefaj partoj estas faritaj el tektono, iliaj frontaj surfacoj surhavas naturajn tigrofelajn desegnojn de kamforligno, kaj la ĉirkaŭaj kadroj de la mebloj inkrustitaj per malhele verda kamforligno. Ĉiuj impresas harmonie. La seĝoj de la mebloj estas faritaj el kamforligno, kiu estas imuna kontraŭ insektoj.

Nun la tradiciaj mebloj el malmola ligno same kiel altklasaj kaj mezklasaj modernaj mebloj de Ĉinio vaste disvendiĝas en Britio, Francio, FR Germanio, Belgio. Japanio, multaj landoj en la Proksima Oriento kaj Meza Oriento, Hongkongo kaj aliaj pli ol 60 landoj kaj regionoj. En la lastaj jaroj ili eksportiĝis ankaŭ al Usono.

Krom tradiciaj mebloj el malmola ligno por eksporto, Ĉinio ĉefe disvolvas produkton de lignaj, metalaj, metal-lignaj, bambuaj kaj lianaj mebloj por liveri al la enlanda merkato. La lignaj mebloj estas ĝenerale

faritaj el belvejna ligno de frak-seno, kverko, tilio kaj tiel plu. Por fari metalajn meblojn oni ĝenerale aplikas altfrekvencan veldon, poluradon kaj galvanizadon. Tiaj mebloj estas glataj kaj brilaj, kaj tiuj statikelektre ŝpruclakitaj estas helkoloraj kaj rustimunaj. La lianaj mebloj ĝenerale estas arteplektitaj sofoj, seĝoj kaj ekranoj.

En la lastaj jaroj Ĉinio ankoraŭ disvolvis la produktadon de dispartigeblaj, faldeblaj kaj pluruzaj mebloj. Tiaj mebloj estas tre ŝatataj de la popolamasoj, ĉar ili estas facile moveblaj kaj transporteblaj. Ili povas esti ne nur kunmetitaj, sed ankaŭ uzataj aparte.

Kun la ĝenerala leviĝo de la vivnivelo la urbanoj kaj kampuloj bezonas pli kaj pli da mebloj. Nun la mebla produkto jam estas difinita kiel unu el la ĉefe disvolvendaj 28 specoj de konsumaĵoj. En 1981 Ĉinio faris 40 milionojn da lignaj, metalaj, metal-lignaj mebloj por civila uzo (ne kalkulante tiujn faritajn en la kamparo), kaj grandan kvanton da bambuaj kaj lianaj mebloj.

Antaŭ nelonge la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj por Indus-

tria Disvolvo kaj la ĉina registaro kune aranĝis Kunsidon pri Artefarita Tabulo kaj la Mebla Industrio. La ĉeestantaj eksterlandaj specialistoj relative alte taksis la meblan industrion de Ĉinio en firma disvolviĝo, post kiam ili aŭskultis koncizan raporton pri ĝia mebla industrio kaj rigardis ĝiajn meblojn.

Kvankam Ĉinio ĉiujare faras pli kaj pli da mebloj, tamen ili ne povas kontentigi la bezonon de la popolanoj urbaj kaj kamparaj. Nun en grandaj urboj kiel Pekino kaj Ŝanhajo oni devas doni aĉetateston aŭ ateston de sia propra oficejo por aĉeti vestoŝrankon, servicoŝrankon aŭ alian grandan meblon. Sed nove geedziĝintaj paroj havas privilegion aĉeti bezonatajn meblojn.

Nun Ĉinio pliigas la meblan produktokvanton per altigo de la produktopovo per mekanikigo kaj duonmekanikigo por pli frue solvi la kontraŭdirojn inter provizado kaj bezono sur la enlanda merkato. Laŭ takso, 40 procentoj de la mebla produktado de Ĉinio estis plenumitaj de mekanikigo. Nun supervarmigita vaporo, fora transruĝo, mikroondoj, mekanikigo de lakado kaj aliaj novaj teknikoj kaj ekipaĵoj de aŭtomatoj kaj kunligitaj maŝinaroj jam komencis esti aplikataj en nia mebla produktado.

Por efike disvolvi teknikan interŝanĝon en la mebla industrio, Ĉinio fondis informan centron por la mebla industrio, kiu eldonas landskalan revuon «Meblo». Nun en la tuta lando jam establiĝis 28 lokaj esplorinstitutoj pri mebloj, kiuj respondecas pri diversaj esploraj laboroj koncernantaj la problemojn en la loka meblo-produktado.




Kompleto da mebloj

Ĉinio ankaŭ dediĉis sian atenton al kulturado de inĝenieroj kaj teknikistoj en la mebla industrio por plialtigi la teknikan nivelon de la produktado. La ŝtato plie starigis mebloprojektan fakon en la Centra Belarta Instituto. La Ministerio de Mal-

peza Industrio kaj la koncernaj unuoj en diversaj provincoj kaj municipoj ofte aranĝas landskajajn aŭ lokajn trejnajn kursojn pri mebla tekniko kaj ili jam starigis plurajn teknikajn lernejojn por la mebla industrio kaj meblistan instituton.

Mebloj inkrustitaj per marmoro



La Esperanto-movado en Ĉinio (2)

LA dua periodo de 1931 ĝis 1949 estis periodo, en kiu la Esperanto-movado de Ĉinio kombiniĝis kun la naci-liberiga movado. Je la 18-a de septembro 1931 la japanaj imperiistoj provokis militon kontraŭ Ĉinio, etendante siajn ungojn al ĝiaj tri nordorientaj provincoj. La kanonado de la japanaj agresantoj ne nur vekis la ĉinan popolon, sed ankaŭ edukis la ĉinajn esperantistojn, kiuj tute forlasis pacifismon kaj suriris vojon ligitan kun la naci-liberiga movado. En ligo kun iuj enlandaj esperantistaj organizaĵoj, la Wuhan-a Esperanto-Instituto la unua faris deklaron al la monda esperantista publiko por protesti kontraŭ perfortaĵoj de la japanaj agresantoj. Baldaŭ junaj esperantistoj de Ŝanhajo fondis la Ĉinan Proletan Esperantistan Union. Same kiel la Unio de Maldekstraj Verkistoj, la Unio de Maldekstraj Sociologoj kaj aliaj maldekstraj kulturaj organizaĵoj, ĝi estis unu el la organizaĵoj gvidataj de la Ĝenerala Maldekstra Kultura Unio, tial ĝi estis nomata ankaŭ la Unio de Maldekstraj Esperantistoj. Sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio, la revoluciaj esperantistoj kombinis sian Esperanto-agadon kun la ĉina revolucio kaj la batalo de la mondaj popoloj por libereco kaj emancipiĝo, tiel kondukante la ĉinan

Esperanto-movadon izolitan de la reala socia vivo sur la ĝustan vojon dividi la dolĉojn kaj maldolĉojn kune kun la vastaj popolamasoj.

Post sia fondo la Ĉina Proleta Esperantista Unio eldonis la organon "Ĉinaj Proletaj Esperantistoj" por propagandi la internacian lingvon inter laboristoj. Ĝi aliĝis al la Internacio de Proleta Esperantistaro, havis rilatojn kun laboristaj Esperanto-organizaĵoj de Japanio, Germanio, Britio, Francio kaj Hispanio kaj kun la Sovetrespublikara Esperantista Unio kaj sekrete publikigis "PEK-Bultenon" por informi al la mondo pri la decido de la Komunista Partio de Ĉinio batali kontraŭ Japanio kaj por nacisavo, pri revoluciaj bazlokoj kaj aktivado de la Ĉina Laborist-Kampanara Ruĝa Armeo, pri la vivo kaj batalo de ĉinaj laboristoj kaj kampanoj kaj la naci-liberiga batalo de Ĉinio.

Por unuigi pli da esperantistoj, la unio fondis en januaro 1933 sian publikan organizaĵon la Ŝanhaja Esperantista Ligo kaj ĝian organon "La Mondo". Tiu ĉi organo elmetis sloganon "Per Esperanto por la liberigo de Ĉinio", kiu bone spegulis la volon de la ĉina esperantistaro kaj akiris ties subtenon. Instigite de tiu slogano, la ĉina Es-

peranto-movado vigle disvolviĝis kun la leviĝo de la kontraŭ-japana nacisava movado.


Nia lingvo tiam floris en Pekino, kie komenciĝis la studenta nacisava movado (la urbo portis la nomon Beiping de 1928 ĝis septembro 1949). Februare de 1932 fondiĝis la Federacio Esperantista de Pepino. Esperantaj kursoj funkciis en pli ol 20 alt- kaj mezlernejoj, kiel la Beiping-a Universitato, la Beiping-a Normala Universitato, Qinghua-universitato, la Ĉina Virina Universitato, Chaoyang-universitato, Yanwu-kolegio, la Beiping-a Normala Kolegio kaj Datong-mezlernejo. Esperanto-institutoj fondiĝis en iuj el tiuj lernejoj. Je la fino samjare starigis la Federacio de Beiping-aj Esperanto-Institutoj, kiu eldonis gazetojn, kiaj "Ruĝa Stelo" kaj "La Stelo Pepina". En la sekvanta jaro fondiĝis unu post la alia la Beiping-a Esperantista Ligo kaj la Beiping-a Korespondanta Esperanto-Lernejo. En junio 1933 la ĵurnalo "Mondo", influa en norda Ĉinio, publikigis la specialan paĝon ĉiusemajne "La Lumo de Esperanto", kiu daŭris kvar jarojn. Tio akcelis la Esperanto-movadon en norda Ĉinio.

La movado progresis ankaŭ en aliaj grandaj kaj mezgrandaj urboj de Ĉinio. En Kantono, la

Urba Normala Esperanto-Lernejo funkciis kelkajn Esperanto-kursojn kaj per tio kulturis nombron da parolantoj de nia lingvo. Ĝi ankaŭ aperigis la monatan gazeton "Kantona Esperantisto" kaj iujn Esperantajn librojn. En Changsha oni fondis Esperanto-instituton kaj poste la gazeton "La Ĝermo". En 1935 la Radiostacio de Changsha ekfunkciigis Esperanto-kurson. En Chengdu oni fondis Esperanto-instituton kaj la monatan gazeton "Verda Flago". Ankaŭ la Esperanto-Instituto de Yunnan stariĝis en tiu periodo kaj aperis la semajna gazeto "La Junnan-a Esp-Movado" kiel aldono de "Junnana Respublika Ĵurnalo". En la sama tempo Esperanto-kurso ekhavis lokon en la radiostacio de la urbo Kunming. Ankaŭ Shanxi-aj esperantistoj organizis sian instituton kaj aperigis la semajnan gazeton "La Dissemanto". La movado viglis ankaŭ en Tianjin, Wuhan, Xi'an, Suzhou, Nanning, Xiamen, Yangzhou, Wuxi, Quanzhou, Jinan, Shaoxing, Hangzhou, Guisui, Taiwan kaj Hongkong.

En la mezo de la 30-aj jaroj iuj ĉinaj esperantistoj ĉinigis el la sovetunia Esperanta gazeto "Nova Etapo" artikolojn pri latinigo de la ĉina skriblingvo, kiuj vekis intereson de ĉinaj kulturaj rondoj. Poste ili sin dediĉis al tiucela movado, eldonis nemalmultajn gazetojn kaj librojn por propagandi reformon de la ĉina skriblingvo.

Dum tiu periodo Lusin daŭre subtenis nian lingvon. Li multfoje monhelpis Esperanto-organizaĵojn kaj kuraĝigis esperantistojn entrepreni tradukadon. En aŭgusto 1936 li en malsano sendis respondan leteron al la redakcio de "La Mondo", en kiu



Parto de la ĉinaj literaturaj verkoj esperantigitaj en la tridekaj kaj kvardekaj jaroj

li refoje konfirmas la socian valoron de Esperanto kaj montris sian fieron pro tio, ke li aprobas la lingvon de 20 jaroj.

En la alttajdo de la kontraŭjapana nacisava movado Ŝanhajaj esperantistoj publike eldonis la gazeton "Ĉinio Hurlas", kiu en konsiderinda grado influis Ĉinion kaj multajn aliajn landojn. Poste aperis en Beiping la internacia koresponda bulteno "Radio", kiu konigis al diversaj landoj la ĉinan kontraŭjapanan nacisavan movadon kaj estis alte taksita de la internacia esperantista publiko.

Post la eksplodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito en julio 1937, ĉinaj esperantistoj eldonis la gazetojn "Al la Nova Etapo" kaj "Justeco" en Kantono, "Voĉoj el Oriento" en Hankou kaj "Orienta Kuriero" en Hongkong. En 1939 sub la gvido de Guo Moĵuo aperis la duonmonata gazeto "Heroldo de Ĉinio", kies legantoj estis troveblaj en pli ol 850 urboj de 63 landoj.

Tiuj periodaĵoj malkaŝis kruelaĵojn de la japanaj agresantoj kaj donis informojn pri la kontraŭjapana batalo de la ĉina popolo. Diverslandaj samideanoj ofte elesperantigis artikolojn de tiuj periodaĵoj por aperigi ilin en sia gepatra lingvo aŭ per tiuj periodaĵoj okazigis ekspozicion. Iuj eĉ iniciatis monokolektadon por helpi ĉinajn plagitajn infanojn, kaj tiel subtenis la justan batalon de la ĉina popolo.

Post la falo de Pekino, Ŝanhajo, Wuhan, Kantono kaj aliaj urboj, Chongqing fariĝis centro de la ĉina Esperanto-movado. S-roj Ĵelezo kaj Venlo Fon fondis tie la Korespondan Esperanto-Lernejon, kiu havis entute pli ol du mil lernantojn. En la malfacilega situacio ili disvastigis nian lingvon kaj unuigis ĉinajn esperantistojn por la kontraŭjapana batalo.

Parto de la esperantistoj de Chongqing publikigis la gazeton "Ĉina Esperantisto". Ankaŭ en

la urbo Chengdu fondiĝis esperantista societo, kiu okazigis ekspozicion kaj kurson de Esperanto.

La Esperanto-movado viglis ankaŭ en la ĉina revolucia sanktejo Yan'an, kie oni starigis esperantistan societon kaj eldonis la gazeton "Jan'an-a Esperantisto". Ankaŭ la Kontraŭjapana Milita kaj Politika Universitato, la Arta Instituto de Lusin kaj la Kultura Asocio de Yan'an okazigis kursojn por instrui nian lingvon. Laŭdire pli ol 300 lokanoj esperantistiĝis. Decembre de 1939 la Yan'an-a Esperantista Societo aranĝis Esperanto-ekspozicion, por kiu Maŭ Zedong faris surskribon cele al instigo lerni la lingvon.


Krome, ankaŭ Esperanto-studrondoj troviĝis en la malamika postfronto, kiel en lokoj sub la Nova Kvara Armeo kaj en la sudorienta parto de Shanxi.

Alia granda sukceso de la ĉina Esperanto-movado en la 30-aj kaj 40-aj jaroj konsistis el eldono de centoj da Esperantaj libroj, kiel tiuj pri la teorio kaj historio de Esperanto, biografio de D-ro Zamenhof, lernolibroj, vortaroj, kantoj, leteroj kaj literaturaĵoj. Oni ankaŭ ĉinigi el Esperanto literaturajn verkojn de Sovetunio, Japanio kaj orienta, okcidenta kaj norda Eŭropo, kiel "Printempo en la Aŭtuno", "Kvardek Poemoj de Petöfi", "Poemoj de Majakovski", "Noveloj de la Mondo" kaj "Noveloj de Bulgario". Estis esperantigitaj iuj ĉinaj literaturaj verkoj, kiel "Elektitaj Noveloj de Lusin", "La Arĝenta Jubileo de la Literatura Agado de S-ro Kuo Mojo", "Patrineto", "Transformiĝo", "Nova Vivo", "Reveno" kaj "Nova Tasko". La versio de tiuj verkoj ne nur ri-


ĉigis la Esperantan literaturon, sed ankaŭ akcelis la kulturen interfluan inter Ĉinio kaj aliaj landoj. La eldonaĵoj multe superis tiujn de la antaŭa periodo kaj kvante kaj kvalite.

Post la venko de la Kontraŭjapana Rezistmilito la Esperanto-movado en diversaj lokoj de Ĉinio preskaŭ stagnis pro tio, ke la kuomintanga registaro intensigis la faŝisman regadon en siaj regionoj kaj provokis enlandan militon kontraŭ la popolo. Nur en malmultaj urboj progresemaj esperantistoj persistis en sia agado. En Chengdu komunisto Eltunko kune kun aliaj esperantistoj de la urbo starigis la Ĉengtuan Esperanto-Ligon, fondis korespondan Esperanto-lernejon kaj eldonis la gazetojn "Ĵurnalistoj", "Ĉinio en Karikaturaj" kaj "Ĉina Muziko" por malkaŝi la enlandan militon de la kuomintanga reaktularo. En 1946 parto de la esperantistoj de Chongqing iniciatis la Ĉinan Esperanto-Instituton, kaj "Ĉina Revuo" aperis en tiu tempo. En Kantono esperantistoj organizis la Kantonan Esperanto-Instituton, fondis korespondan Esperanto-lernejon kaj aperigis la

gazeton "Verda Ondo" unu fojon ĉiusemajne en la tagjurnalo "Sun Jatsen". En Nankino oni organizis klubon de esperantistoj kaj publikigis la gazeton "La Ĝermo". En Fujian-provinco fervoraj samideanoj aperigis la semajnan gazeton "Esperanto" en "Fujian-jurnalo" por heroldi la enlandan Esperanto-movadon kaj propagandi la lingvon mem. Sed la kuomintanga reaktularo limigis kaj eĉ malpermesis la ekziston de la progresema Esperanto-movado, tiel ke la movado ĉesis en iuj lokoj. Iuj esperantistoj estis eĉ arestitaj aŭ mortigitaj. Niaj samideanoj Eltunko, Jang Qiuzhen k.a. ja oferis sian junan vivon en karceroj de la malamiko. Pro tio la prezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo Hujucz diris en 1951: "Ni ne devas forgesi, ke la Esperanto-movado de nia lando kreskis sub kruela premado de la reaktaria reganta klaso, en malliberejoj kaj koncentrejoj, en kiuj estis enfermitaj niaj revoluciuloj. La nomoj de nemalmultaj esperantistoj troviĝas en la listo de popolaj herooj, kiuj mortis pro la revolucio dum la pasintaj 30 jaroj."



Parto de la eksterlandaj literaturaj verkoj ĉinigitaj el Esperanto en la tridekaj kaj kvardekaj jaroj



HAO JIANXIU, MINISTRO DEVENINTA DE ŜPINISTINO

*(Vd. la artikolon "Post
Kiam Ŝi Fariĝis Ministro"
en tiu ĉi numero)*


Hao Jianxiu, ministro de tekstila industrio de Ĉinio



Hao Jianxiu (dekstre) intervidiĝas kun japanaj gastoj en Pekino.



Hao Jianxiu (maldekstre) tenas intimajn rilatojn kun laboristinoj.




Hao Jianxiu (dekstre) lernis de veterana laboristo teknikon pri maŝin-riparado en la komenco de la 50-aj jaroj, kiam ŝi estis ŝpinistino en la Sesa Tekstila Fabriko en Qingdao.



Hao Jianxiu (meze) studis en la Orientĉinia Tekstila Instituto de 1958 ĝis 1962. Jen ŝi faras kemian eksperimenton kun siaj kunlernantoj.

Ĉinio inventis energi-ŝparan akvoturbinan pumpilon kun akvofalo kiel movforto. Tia pumpilo ne bezonas hejtajn nek elektron. Ĝi estas malmulte kosta kaj kaŭzas nenian polucion. Levante akvon por irigacii kampojn, ĝi produktas elektron por lumigado kaj malgranda prilaborado. Nun Fujian-provinco de Ĉinio konstruis 2,490 staciojn kun 3,670 tiaj pumpiloj de ĉ. 164,000 ĉevalpovo, kiuj povas irigacii pli ol 26,000 hektarojn da agroj. Ili povas multe ŝparigi dizeloleon kaj elektron.



Nove muntita akvoturbinapumpilo

Hao Jianxiu kaj ŝiaj infanoj




Energi-ŝpara akvoturbina pumpilo




La stacio de akvoturbina pumpilo de Xudun-komunumo, Jian'ou-gubernio, Fujian-provinco, irigacias 385 hektarojn da agroj kaj ĉiujare produktas 10 milionojn da kilovatthoroj da elektro.

Hao Jianxiu kaj ŝia edzo preparas pladojn.






Eksterlandaj fakuloj vizitas stacion de akvoturbina pumpilo dum sia partopreno en la internacia simpozio pri akvolevilo kaj akvomastumado en Fuzhou, Ĉinio.



Ekstera aspekto de la stacio de akvoturbina pumpilo Dong-you



La laborejo de akvoturbina pumpilo de la Nanping-a Generatora Fabriko, Fujian-provinco



Gastamaj hispanaj esperantistoj

de YANG YONGSEN

EN aŭtuno de 1981, kiel membro de la delegacio de la Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj (Guoji Shudian) mi iris al Hispanio por aranĝi ekspozicion de libroj kaj gazetoj. Iutage, kiam mi estis vespermanĝanta en iu restoracio de Madrido, envenis kvar gejunuloj, kiuj demandis min hispanlingve: "Ĉu ĉi tie estas ĉina delegacio?" Mi respondis ke jes. Kaj ili demandis plue: "Ĉu troviĝas en ĝi sinjoro Yang? Tio ege surprizis min kaj mi trovis, ke ili estas esperantistoj. Pri mia alveno ili sciiĝis de sinjoro Felix, peranto de Guoji Shudian en Hispanio.

La unuaj kvar geesperantistoj, kiujn mi renkontis en Hispanio, estis Augusto, prezidanto de la Madrida Esperanto-Liceo; Juan Carlos, ĝia vicprezidanto; Alicia, ĝia sekretariino; kaj fraŭlino Maribel.

Tiun nokton ni multe interparolis. Juan Carlos tre interesiĝis pri la ĉina medicino kaj la ĉina skriba lingvo. Li esperis ke iun tagon li povos viziti Ĉinion. Ni interŝanĝis opiniojn pri la distribuado de Guoji Shudian. Mi

donis al ili leteron kaj pakon da Esperantaj libroj kaj gazetoj de la Pekina Esperanto-Asocio, por transsendo al la Hispana Esperanto-Federacio en Valladolid.

Pro la invito de tiuj gesami-deanoj, mi prenis Esperantan tagmanĝon en la hejmo de Alicia. Mi diras "Esperanta tagmanĝo", ne nur pro tio, ke ni parolis Esperante dum la manĝado, sed ankaŭ pro tio, ke la manĝaĵoj, tipe hispanaj kaj preparitaj de la mastrino kaj ŝia amikino Carmen, estis metitaj sur tablo kiu havis Esperantajn alumetojn kaj Esperantan cindrujon, kaj sur la planko sin trovis granda Esperanta stelo el tabuletoj. Alicia, ŝia avo kaj patro ĉiuj estas esperantistoj. La patro, kiu scipovas ĉarpentadon, mem faris la tablon, la seĝojn kaj la plankon de la salono, inkluzive la menciitan stelon. Pro amo al Ĉinio, li faris ŝrankon en antikva ĉina stilo. Se ili ne klarigus tion al mi, mi certe pensus, ke ĝi estis produktaĵo de Ĉinio. Alia verko de la patro estas ekranego, sur kiu pentriĝis ĉinaj homfiguroj.

Post la tagmanĝo, la juna barbulo Pedro, unu el miaj kunmanĝantoj, ludis sur piano la Himnon de Madrida Esperanto-Liceo, kiun Alicia kantis. Ĝi estas bela himno, komponita de Pedro mem, kun teksto de Juan Carlos.

La liceo eldonas Esperantan gazeton, kies redaktoro estas Miguel, junulo kiu sidis apud mi dum la tagmanĝo.

Nokte, la ceteraj du membroj de la delegacio de Guoji Shudian kaj mi partoprenis Esperantan renkontiĝon en la liceo. Nin atendis en salono ĉirkaŭ tridek personoj, sidantaj en rondo. Mi koncize rakontis al ili pri la Esperanto-movado en Ĉinio, pri kiu la ĉeestantoj montris grandan intereson. Ili diris, ke "El Popola Ĉinio" eldonita dum la "kultura revolucio" estis malfacile komprenebla, odoranta propagandon. Nun ĝi estas multe pli bona kaj riĉa je diversaj informoj, inkluzive de kulturo, arto, medicino, sanitara servo kaj Esperanto-movado. Utiligante la okazon, Felix, sperta peranto de "El Popola Ĉinio",

tuj disdonis abonilojn de la gazeto por varbi abonantojn.

La kunveno aranĝita de madridaj geesperantistoj estis fakte multflanka internacia renkontiĝo. Krom hispanoj kaj ĉinoj, inter la ĉeestantoj estis ankaŭ polino, italo, du gekolombianoj kaj irananino. La polino Ada estas redaktorino de "Heroldo de Esperanto". Ŝi bele parolas Esperanton, pere de kiu ŝi konatiĝis kun sia edzo, la italo. Hejme ili interparolas tute Esperante.

La Madrida Esperanto-Liceo lokiĝas en malnova etaĝdomo de pli ol cent jaroj. Tage ĝi estas ŝlosita. La klaso funkcias nokte. Ĉiu kurso daŭras tri monatojn, dum kiuj oni lernas Esperanton en pluraj grupoj, kiuj havis mil kursanojn en 1979. Krom klasĉambroj, la liceo estas provizita de memserva trinkejo. Ĝi havas Esperantajn alumetojn, afiŝojn,

kalendarkartojn k.a. La instruistoj bone konas la lingvon.

Nia interbabilado longe daŭris kaj restis vigla malgraŭ la malfruigo de la nokto. Venis tempo por adiaŭi, sed ni ankoraŭ ne volis tuj disiĝi.

Je la unua tago de la ekspozicio, en kiu estis elmontritaj ankaŭ ĉinaj Esperantaj legajoj, Augusto, Alicia kaj aliaj tri esperantistoj atendis ĉe la enirejo de la pavilono antaŭ ol ĝi malfermiĝis. Ili foraĉetis ĉiujn tiujn eldonaĵojn en la unuaj dek minutoj post la inaŭguro de la ekspozicio.

Oni diris, ke en Madrido ekzistas aliaj kvar aŭ kvin Esperantaj grupoj kiujn mi bedaŭrinde ne povis kontakti pro manko de tempo. La madrida Esperanta movado karakteriziĝas per granda nombro da junaj gesami-

deanoj viglaj kaj fervoraj. Augusto diris al mi: "Mi scias, ke Ĉinio eldonas ankaŭ librojn kaj gazetojn en la hispana lingvo, sed mi preferas legi la Esperantajn."


En Barcelono ni ĝoje renkontiĝis kun s-ano Alfonso, vicprezidanto de la Hispana Esperanto-Instituto kaj delegito de UEA. Lia solfilo, 14-jara, havas la saman nomon kiel li. Ambaŭ parolas Esperanton tre flue. La patrino de alfonso-filo povas kompreni Esperanton, kvankam ŝi malmulte ĝin parolas. Dum nia gastado en ilia hejmo, ŝi mem kuiris por ni manĝon kaj komunikis al ni la kulinaran arton.

Ili havas verdan aŭton, kun verda stelo ĉe la maldekstra flanko de ĝia kapo. La patro kaj filo akompanis nin al Montjuich-parko, la bronza statuo de Teksistino, la tropika botanika ĝardeno, la haveno kaj aliaj vidindaĵoj. Dank' al ilia klarigo, ni pli multe informiĝis pri la historio kaj hodiaŭo de Hispanio, pri la malfeliĉo, kiun ĝi suferis.

Alfonso komencis instrui Esperanton al sia filo kiam tiu ĉi estis ankoraŭ malgranda kaj ofte konversaciis kun li Esperante. Pro tio, la filo lernis kaj progresis rapide. Tio pruvis, ke la junago estas la oportuna tempo por la ĝermado de la verda semo.

La Esperanto-movado en Hispanio abundas je freŝa sango. Ekzistas Esperantaj geedzoj, Esperantaj patro kaj filo, kaj Esperanta avo-patro-filino. Tio montras, ke Esperanto ne nur servas kiel instrumento por internacia komunikiĝo, sed ankaŭ povas enradikiĝi en la ĉiutaga vivo. La lingvo de D-ro Esperanto vere estas plena je espero.

La aŭtoro (la dua de dekstre) kun s-ro Alfonso (la unua de dekstre) kaj aliaj en Barcelono



ĈINAJ ESP-ISTOJ FESTAS NASKIĜTAGON DE D-RO ZAMENHOF

Meze de decembro 1981 ĉinaj esperantistoj faris diversajn aktivadojn por festi la 122-an datrevenon de la naskiĝo de d-ro Zamenhof.

La Yunnan-a Esperanto-Asocio kunvokis kunsidon en la provinca Sociologia Akademio. En la kunsido Hong Shuxun, ĝenerala sekretario de la asocio, faris paroladon kun la temo "Esperanto Marŝas". En sia parolado li traktis la historion de la Esperanto-movado kaj koniĝis al la ĉeestantoj la trajtojn de la ĉina Esp-movado kaj ĝian nunan bonan staton. Festis ankaŭ la esperantistoj de la regiono Gejiu en la sama provinco.

En Taiyuan, la ĉefurbo de Shanxi-provinco, pli ol 200 esperantistoj ĉeestis kunvenon memore al nia majstro. Ili aŭskultis prelegon pri la vivo de Zamenhof. En la kunveno junaj esperantistoj prezentis programerojn verkitajn de ili mem.

En Shashi, Hubei-provinco, esperantistoj okazigis malgrandan ekspozicion en la urba Kulturdomo, kie oni eksponis diversajn esperantajjn. La ekspozicio altiris multajn vizitantojn.

Ankaŭ Esperantaj organizaĵoj en Kantono, Lanzhou, Nanning, Wuxi kaj aliaj urboj aranĝis similajn aktivadojn.

ESPERANTA LABORKUNVENO EN HUNAN-PROVINCO

En la mezo de decembro 1981 en la urbo Changsha okazis laborkunveno de la Hunan-a Esp-asocio, kiun ĉeestis esperantistoj el Changsha, Hengyang, Xiangtan, Yueyang kaj aliaj lokoj. La kunveno resumis la Esperantan aktivadon en la provinco dum 1981. Laŭ statistiko la Esp-kursanoj en la provinco jam atingis

mil. La ĉeestantoj ankaŭ interŝanĝis spertojn pri nedevegaj Esp-kursoj en elementaj, mezaj kaj superaj lernejoj. Ili opiniis, ke funkciigo de nedevegaj Esp-kursoj estas provo por reformi la fremdlingvan instruadon en Ĉinio.

ESPERANTA ESPLOR-GRUPO EN HEILONGJIANG- PROVINO FONDITA

La kvara reprezenta kunveno de la Fremdlingva Asocio de Heilongjiang-provinco okazis en Harbin, la provinca ĉefurbo, en la unua tagdeko de decembro 1981. Ĝin ĉeestis Zhang Yan, vicprezidanto de la provinca Lingvo-Instituto; Ma Ning, estro de la Fako por Fundamentaj Kursoj de la Harbina Politekniko; You Kuanren, membro de la Politika Interkonsiliĝa Konferenco de Heilongjiang-provinco kaj vicesploristo de la nomita politekniko; kaj aliaj kvin esperantistoj. Ili diskutis pri la disvolviĝo de la tiea Esp-movado en la lastaj jaroj kaj organizis la provincan Esperantan Esplor-grupon. Zhang Yan estis elektita kiel ĝia estro, Ma Ning kaj Yang Ren kiel ĝiaj vicestroj.

PLIVASTIGITA KUNVENO DE LA PREPARA GRUPO DE JIANGSU-A ESP-ASOCIO

La nomita kunveno okazis en Nankino la 15-an de decembro 1981. La kunvenantoj interŝanĝis spertojn

kaj interparolis pri la nuna stato de Esp-movado en Jiangsu-provinco, diskutis pri la statuto de la asocio kaj okazigis Esperantan simpozion. Xu Fushi, vicprezidanto de la Sociologia Akademio de la provinco, faris paroladon en la simpozio.

LABORKUNVENO DE LA CHONGQING-A ESP-LIGO

La 6-an de decembro 1981 okazis la laborkunveno, dum kiu respondeculo de la ligo faris raporton, kiu montris, ke la Esp-movado en la urbo atingis rimarkindan sukceson en la pasintaj du jaroj. Nun pli ol 400 personoj en la urbo jam finis sian lernadon en elementaj Esp-kursoj kaj la ligo jam nombras pli ol 140 personojn, inter kiuj estas nur 40 malnovaj membroj. La Unuigita Lernejo de la Urbocentra Laborista Sindikato funkciigis jam du du-jarajn Esp-kursojn. Finiĝis du nedevegaj Esperanto-kursoj en la Tria Normala Lernejo de Chongqing. Dum la laborkunveno oni okazigis la unuan ĉin-ŝakan turniron de Chongqing-aj esp-istoj, projekciis lumbildojn kaj prezentis programe-rojn.

PROGRESIS ESP-MOVADO EN ANHUI-PROVINCO

En Anhui-provinco oni okazigis sinsekve ok elementajn Esp-kursojn, du progresigajn kursojn kaj unu

Laborkunveno de la Chongqing-a Esp-Ligo en 1981




korespondan lernejon. Por helpi la korespondan instruadon, oni funkciigis ankaŭ televidan kurson. En la provinco jam aperis 3,500 Esperanto-kursanoj. La Esp-asocio de la provinco decidis pli bone gvidi la laboron rilate la elkulturon de Esp-instruistoj, la korespondan lernejon kaj la eldonadon de la asocia revuo.

ESP-SOCIETO FONDITA EN LA UNIVERSITATO DE HANGZHOU

La societo fondiĝis la 28-an de novembro 1981 en la nomita universitato proksime de la Okcidenta Lago. En ĝia inaŭgura kunveno partoprenata de proksimume 200 personoj, faris paroladon vicprofesoro Lu Moye kaj aliaj membroj de la prepara grupo de la Hangzhou-a Esp-asocio.

LPLP LANĈAS TERMINOLOGIAN RUBRIKON

La revuo Lingvaj Problemoj kaj Lingvo-Planado, eldonata de la Eldonejo de la Universitato de Teksaso sub aŭspicio de la Centro de Esploro kaj Dokumentado ĉe UEA (CED), inaŭguros la novan rubrikon "Terminologio", ekde la unua numero de la sesa jarkolekto, aperonta en la printempo de 1982. La rubriko kontribuos al la prak-



Doktoriĝa ekzameno de A. Sakaguchi

tika lingvoplanado per notoj, ĉefe pri la normigo de la lingvonomoj, la gentonomoj kaj lingvistika terminaro, aparte la terminaro de la lingvoplanado. Kontribuoj pri la normigo ankaŭ de la Esperanta terminaro en tiuj interesokampoj estas bonvenaj por konsidero. Oni sendu manuskriptojn, tajpitajn kun inter-spaco, al la redaktoro de LPLP, d-ro Richard E. Wood, Dept. of English, Southeast Missouri State University, Cape Girardeau, Missouri 63701, Usono. Abonojn, je prezo de US \$ 15.00 por unuopuloj kaj de US \$ 24.00 por institucioj, oni sendu al Journals Dept., University of Texas Press, P.O. Box 7819, Austin, TX 78712, Usono.

DOKTORIĜA EKZAMENO

La 16-an de oktobro 1981 doktoriĝis en la Universitato ELTE, Budapeŝto, Hungario, Michiewcz-Sakaguchi Alicja, magistro pri la hungara lingvo kaj esperantologio. La titolo de ŝia disertaĵo estis: "La lingva modeligo en fremdlingva instruado kaj interlingvistiko" (temogvidanto kaj recenzanto prof. d-ro Szerdahelyi Istvan).

Tio estis la tria doktoriĝo en la Budapeŝta Universitato pri interlingvistika-esperantologia temo. La unua estis de Szabo Mata Maria Rozsa pri la semantika modeligo en la filozofiaj lingvoj, la dua de Balogh Judit pri la rolo de Esperanto kiel pontlingvo en la instruado de fremdaj lingvoj.

"EL POPOLA ĈINIO" RIGARDKAPTILO ĈE URBOFESTO

En Soltau, urbeto en okcidenta Germanio, en ĉiu dua jaro okazas urbofesto. En la festo multaj komercistoj, kluboj kaj grupoj partoprenas kaj varbas. Ankaŭ la loka Esperanto-grupo prezentas sin. En 1981 estis aparta rigardkaptilo la gazeto "El Popola Ĉinio" kun afrankitaj kovertoj el Ĉinio kaj aliaj landoj. Per tiuj objektoj, kiuj tre plaĉis, komenciĝis multaj interparoloj pri disvastigo de Esperanto. La bildo montras la standon dum konstruado.

"El Popola Ĉinio" eksponata en la 1981-jara urbo-festo de Soltau, okcidenta Germanio



Vojaĝo en la hejmloko de Konfuceo

KIAM la unuaj sunradioj de la tagiĝo enpenetris tra la vagonaraj fenestroj, nia ekspreso de Pekino al Qingdao estis jam kuranta sur Shandong-duoninsulo. Baldaŭ ni atingis la urbon Qingdao, la unuan etapon en nia vizito al Shandong-provinco.

La provinco estas hejmloko de Konfuceo, fama ĉina pensulo en la 5-a jarcento a.K. Ĝi situas en orienta Ĉinio, ĉe la malsupra baseno de la Flava Rivero, kaj ampleksas ankaŭ la menciitan duoninsulon. Tie serpentumas la marbordo, imponas montegoj kaj larĝe etendiĝas ebenaĵoj. Fruktona estas la tero kaj oportuna la trafiko. Antaŭ cent mil aŭ ducent mil jaroj en tiu parto de la mondo vivis niaj prapatroj, kaj ĝi fariĝis unu el la luliloj de nia antikva kulturo, tiel ke troviĝas multe da vidindaj lokoj kaj historiaj restaĵoj. Ni vizitis dek tri urbojn kaj guberniojn dum nia trisemajna vojaĝo, kiu multe vastigis nian horizonton. Nun permesu al mi skizi nur kelkajn el ili.

ĈE LA "RESTADEJO DE DIOJ"

Qingdao, ĉarma apudmara urbo, kiel oni diras, karakteriziĝas per ruĝaj tegoltegmentaj domoj, verdaj arboj, blua maro kaj lazura ĉielo. Tie somero estas la plej bela sezono. Kun temperaturo ne pli alta ol 25°C en aŭgusto, la plej varma monato en la tuta jaro, la urbo prezentas al ni idealan somerumejon. Ĉiutage miloj kaj dekmiloj da naĝ-

amantoj altiriĝas al ĝiaj sep plaĝoj. Tamen nun estis malfrua aŭtuno, kaj por ĝui marakvan banon estis jam tro malfrue — super ĉiuj plaĝoj regis silento. Anstataŭe ni estis invititaj ekskursi al Laoshan-monto, kiu, konata kiel la "Restadejo de Dioj", sin trovas 30 kilometrojn for de la urbo.


Ekpluvis, kiam ni veturis al la monto. Nia aŭtobuso balanciĝis orienten laŭ la serpentuma montvojo apud la Flava Maro. Nebulo ŝvebis en la senĉesa pluvo kaj ondantaj montĉenoj, kio sentigis al ni ian supermondecon. La monto kovras areon de ĉirkaŭ 416 kvadrataj kilometroj. Ĝia ĉefa pinto, alta je 1,133 metroj, estas malpli alta ol Taishan-monto, tamen aspektas aparte kruta pro tio, ke ĝi abrupte leviĝas tuj apud la maro. Tie la monto kaj la maro kunligiĝas kaj troviĝas multaj raraj kreskaĵoj. En antikveco alkemistoj kaj ŝamanoj alvenadis por serĉi senmortigajn herbojn por prepari eliksiron. Koncernaj legendoj ne mankas. Sur la maro sudoriente de la monto montriĝas ok ŝtonblokoj, kiuj laŭlegende indikas la lokon, de kie ok feoj siatempe transiris la maron. La monto estas ankaŭ unu el la gravaj luliloj de taoismo. De la 2-a jarcento tie stariĝis taoismaj temploj unu post alia. En la plej prospera tempo estis entute 22 tiaj temploj, kun miloj da taoistoj. Inter alie Taiqing-templo estas la plej granda, kun plej longa historio.

La templo staras ĉe la piedo de la suda deklivo de la monto. Trapasinte bambuaron, ni venis antaŭ ĝian pordegon. Ĝi konsistas el tri kortoj. La konstruajaro, blankmura kaj nigratego-la, sen luksaj ornamoj, estas ĉirkaŭita de altaj pinoj, kio montras la sobran modestecon de taoistoj. En la orienta korto estas du ĉiamverdaj arboj, kaj la trunko de unu el ili estas tiel dika, ke oni apenaŭ povas ĝin ĉirkaŭpreni. Ĝiaj fortikaj branĉoj ŝirmas pli ol duonon de la korto. Oni klarigis al ni, ke tia arbo estas rara kaj valora, kaj dum florado ĉiuj ĝiaj branĉoj estas iluminitaj per fajre ruĝaj floroj. En la imago de Pu Songling, fama verkisto en la 17-a jarcento, tiu arbo estis aminda flor-feino, kaj tion li enskribis en sian novel-kolekton "Notoj pri Strangajoj de Liaŭĝaj".

Ĉe Laoshan-monto troviĝas multe da vidindaj lokoj, inter kiuj Jiushui-rivero estas aparte menciinda. Ĝi fontas ĉe la ĉefa pinto de la monto kaj zigzagas malsupren laŭ la deklivo. Ambaŭborde viciĝas sennombraj groteskaj rokoj. La akvo, klara, dolĉa kaj refreŝiga, entenas sanigajn mineralojn. La biero de Qingdao, kiu ĝuas renomon en eksterlande, estas preparita kun la tiea minerala akvo.

GUI BRANDON "ORA MEDALO"

240 kilometrojn nordoriente de Qingdao troviĝas alia apudmara



La malkovrita aperturo de kloako en la ĉefurbo de la antikva Qi-regno

urbo Yantai. Laŭ historiaj notoj, en la 3-a jarcento a.K. la unua imperiestro de Qin-dinastio trifoje inspektis la tian laboron. Oni tiam nomis la lokon Zhifu. Dum Ming-dinastio, ĉe la fino de la 14-a jarcento, landlima gvardio posteniĝis ĉi tie kaj signalfajraj turoj stariĝis sur ĉiuj montsuproj. Kiam malamikoj atakis, oni bruligis fekaĵojn de lupoj kaj la densa fumo servis kiel alarmsignalo. Oni do nomis tiujn turojn fumturoj, kaj de tio venis kaj la nomo de monteto Yantai, sur kiu troviĝas tia signalfajra turo, kaj la nomo de la urbo. (“Yantai” signifas “fumturo” en la ĉina lingvo —Trad.)

La urbo estas unu el la bazlokoj por la ekstera komerco. Tien venas de diversaj landoj multe da komercistoj, kiuj forte interesiĝas pri la brodaĵoj lanaj kaj silkaj, filigranaj punktoj kaj bonegaj vinoj, kiuj ĉiuj havas longan historion. Laŭinvite ni vizitis la vinkompanion ĉe la piedo de Yantai-monto. Ĝi estis fondita de patriota elmigrinta ĉino en 1892.

Kondukinte nin en la vinkeilon, la direktoro de la kompanio gustumigis al ni kelkajn el siaj propraj produktaĵoj. Levinte glason da vino en sukkena koloro, li proponis: “Bonvolu, jen

brando kun la marko ‘Ora Medalo’, farita el bonkvalitaj vinberoj. En 1915 ĝi ricevis oran medalon ĉe la internacia foiro en Panamo, kaj pro tio ĝi ricevis la nunan markon. En la pasintaj kelkdek jaroj ĝi ĉiam konservis siajn tradiciajn kvalitojn.” Mi ĝin gustumis. Ho, vere dolĉa, bonodora, refreŝiga brando, kiel la famo asertas! Ankaŭ ruĝa vino kaj vermuto estas famaj produktaĵoj de la kompanio. De la kvindekaj jaroj la triopo estis plurfoje honorita kiel eminentaj trinkaĵoj de la lando. Kaj en la pasintaj du jaroj la brando “Ora Medalo” kaj la ruĝa vino ricevis oran medalon de la ŝtato kaj fariĝis ŝatataj trinkaĵoj ĉe bankadoj. Nun la kompanio produktas 10,000 tunojn da diversaj vinoj ĉiujare, 360-oble pli multe ol en 1949, tamen ĝi ankoraŭ ne povas kontentigi la bezonon de la enkaj eksterlanda merkatoj. La direktoro diris, ke nova fabriksdomo kun areo de 7,400 kvadrataj metroj estas nun konstruata, kaj li petis nin viziti ĝin post ĝia finkonstruo.

“ŜTONA ENCIKLOPEDIO”

De longe mi informiĝis, ke la fosilioj en Shanwang estas plej famaj en la lando. Finfine venis al mi la ŝanco ilin vidi per miaj propraj okuloj. Forlasinte la gu-

bernian urbeton Linq, post pli-ol-unu-hora veturo orienten per aŭtobuso, ni atingis la montvilaĝon Shanwang. Antaŭ ni prezentiĝis kelkaj ekspluatataj montoj, ĉirkaŭbaritaj de brika muro. Ni alproksimiĝis kaj trovis, ke sur la montoj estas nek humo, nek rokoj, sed malkompakta diatomea tero. Tavolo sur tavolo, la tero aspektas kiel stako da pappecoj kaj inter tiuj sennombraj tavoloj konserviĝas fosilioj de estaĵoj antaŭ 14 milionoj da jaroj. La lokanoj figure nomas ilin “Ŝtona Enciklopedio”.

Frue en la tridekaj jaroj du arkeologiaj profesoroj de nia lando esploris la fosiliojn tie. Ĝis nun niaj sciencistoj jam elfosis milon da perfekte konservitaj fosilioj de praestaĵoj, inkluzive tiujn de vertebruloj de kvin klasoj, nome, la fiŝoj, la amfibioj, la rampuloj, la mamuloj kaj eĉ la birdoj, kiuj tre malofte fosiliĝis. Krome, oni trovis ankaŭ fosiliojn de araneoj kun lanugo sur la kruroj, de buntaj papilioj kaj de branĉoj, folioj, floroj kaj fruktoj. Tiuj fosilioj servas al la homaro kiel elokventaj atestaĵoj por pristudi la ŝanĝiĝojn de la naturo kaj la evoluon de estaĵoj. Kaprice skrapante la prifositan diatomean teron, ni baldaŭ trovis kelkajn fosiliojn de folioj kaj fiŝetoj. Ho, kiel riĉa regno de fosilioj!

Oni sciigis al ni, ke per la esplorado oni konstatis, ke la diatomea tero en Shanwang kovras areon de 1.2 kvadrataj kilometroj kaj estas dika je 7-10 metroj. Nun la loko, kiel grava kultura konservaĵo, estas protektata de la ŝtato, por ke oni laŭplane ĝin prifosu kaj studu en la estonteco. Mi kredas, ke por tiuj, kiuj ŝatas kolekti fosiliojn

de praestajoj, tiu loko certe estas io mirinde magneta.

EN LA IAMA ĈEFURBO DE QI-REGNO

Nia aŭtobuso rapidis sur vasta ebenajo. Kiam antaŭ niaj okuloj aperis densaj antikvaj tomboj, oni klarigis, ke ni alvenis al la iama ĉefurbo de Qi-regno — Linzi, kiu nun estas parto de la urbo Zibo.

La sepa reĝo de Qi-regno prenis Linzi kiel sian novan ĉefurbon en la mezo de la 9-a jarcento a.K. De post tio, dum 638 jaroj tra la resto de la Okcidenta Zhou (de ĉ. 11-a jc. ĝis 770 a.K.) kaj la Orienta Zhou, kiu estas dividita en du periodoj: “Printempo kaj Aŭtuno” (770 — 476 a.K.) kaj “Militantaj Regnoj” (475—221 a.K.), Linzi restis la ĉefurbo de Qi-regno, unu el la ĉefaj orientaj regnoj, ĝis la jaro 221 a.K., kiam Qin-regno aneksis Qi-regnon. En la florantaj jaroj de Qi-regno, Linzi prezentis sin kiel unu el la plej grandaj urboj en antikva Ĉinio, kun 70,000 familioj kaj 300,000 loĝantoj. Hodiaŭ vidiĝas tie nek grandiozaj palacoj, nek luksaj pavilonoj, sed ankoraŭ konserviĝas valoraj historiaj restaĵoj.

Arkeologia esploro malkovris, ke la ĉefurbo fakte konsistis el du urboj, unu granda kaj la alia malgranda. La du urboj harmonie kunligiĝis unu kun la alia kaj la totala longeco de la urbomuro estis 21 kilometroj. Hodiaŭ ankoraŭ restas parto de la muro kaj rimarkeblaj estas la postsignoj de ramado. En la nordokcidenta parto de la urbo ni vidis la iaman drenkanalon, kiun oni antaŭ nelonge malkovris. Longa je 43 metroj kaj larĝa je 7 metroj, ĝi estis masonita en tri etaĝojn per krudaj ŝtonoj, kun 5

kvadrataj aperturoj en ĉiu etaĝo. Pro sia genia aranĝo ĝi povis ne nur ellasi la eluzitan akvon de la urbo, sed ankaŭ malhelpi malamikojn surprize ataki la urbon tra la drenkanalo. Vere admirindaj estas niaj saĝaj antikvuloj!

Ankoraŭ pli fortan admiron vekis en ni la tunelo por oferitaj ĉevaloj, kiu estis malkovrita en la nordorienta parto de la urbo en 1964. Ĝi estas pli ol 210 metrojn longa kaj 5 metrojn larĝa. Oni trafosis parton de la tunelo kaj elterigis 228 oferitajn ĉevalojn. Laŭ la taksado, pli ol 500 ĉevaloj estis enterigitaj siatempe. Specialistoj konstatis, ke ĉiuj oferitaj ĉevaloj estis kastritaj batalĉevaloj, kiujn oni mortigis kaj poste vicigis tie. Bonorde, unu apud alia, la ĉevaloj staras en du vicoj, ĉiu ŝajne galopanta kun la kapo alte levita. La tunelo apartenas al la periodo “Printempo kaj Aŭtuno” kaj verŝajne estas akompana tombo de iu reĝo de Qi-regno. Ĝi estas la unua malkovro de tunelo por oferitaj ĉevaloj en tiel granda skalo. Bedaŭrinde, pro malfavoraj kondiĉoj, la tunelo ne estis bone protektita kaj repleniĝis per tero post la elterigo de la ĉevaloj. Nun ni povas ĝin vidi nur en la fotoj ekspoziciitaj en la Administrejo por Historiaj Restaĵoj de Linzi. Por mildigi nian maltrankvilon, oni sciigis al ni, ke la Ŝtata Administrejo por Historiaj Restaĵoj jam aprobis planon refosi la tunelon kaj sur ĝi konstruigi ekspoziciejon en nacia stilo. Espereble baldaŭ venos la realiĝo de la plano.


TRANOKTADO EN LA HEJMO DE KONFUCEO

Kompare kun la ĉefurbo de Qi-regno, Qufu, la ĉefurbo de Lu-regno dum la samaj periodoj,

estas tamen pli bone konservita, ĉar tie troviĝas la hejmloko de Konfuceo.

Kiam ni atingis la urbon, ni tuj rimarkis grupon da grandiozaj antikvaj konstruaĵoj. Tio estas la Templo de Konfuceo, kie siatempe oni kultis Konfuceon kaj tiu ĝuas grandan renomon tra la mondo. En la jaro 478 a. K. nome en la sekva jaro post kiam mortis Konfuceo, kiu estis honorita kiel sanktulo, Aigong, reĝo de Lu-regno, konstruigis en templon la tri domojn loĝitajn de Konfuceo. De tiam la imperiestroj de diversaj dinastioj, kiuj deziris firmigi sian feŭdan regadon per la ideologia sistemo de Konfuceo, donadis al la templo riparon kaj plikonstruon. Nun la templo konsistas el naŭ sinsekvaj sekcioj, kun 466 haloj kaj pavilonoj, kaj kun areo de 96,000 kvadrataj metroj. Ĝiaj skalo kaj pompa aspekto povas rivali kun la Imperiestra Palaco en Pekino. La loko, kie troviĝas la tombo de Konfuceo, jam fariĝis granda parko, kies areo estas duoblo de tiu de la gubernia urbo Qufu, kun tombejo propra al la familio de Konfuceo.

Ni tranoktis ĉe la okcidenta korto en la hejmo de Konfuceo, kiu sin trovas oriente de la templo. Kiel tipa bieno de feŭda aristokrato, ĝi havas 463 ĉambrojn, kiuj estas dividitaj en tri partoj, sen ĝardeno. La idaro de Konfuceo iam prenis ĝin kiel sian loĝejon. Ĉe la okcidenta korto la konstruoj, subdividitaj en naŭ sinsekvajn sekciojn, rimarkinde montras la originalan arkitekturan stilon en antikva Ĉinio. Dum pluraj generacioj la mastroj de la domo uzis tiun ĉi parton por librolegado kaj akcepto de siaj honorindaj gastoj. La korto estas dekoraciita per raraj



*Haltejo de Konfuceo
por lia grimpado al
Taishan-monto*

arboj kaj floroj, kaj la tuta medio spiras agrablan kvietecon. Nun ĝi servas kiel hotelo por turistoj kaj ĉiutage akceptas vizitantojn el diversaj partoj de la mondo. Manĝaĵoj en ĉina aŭ eŭropa stilo estas akireblaj en la restoracio kaj, laŭmende, oni eĉ preparas bankedojn en la maniero, kiel oni siatempe tion faris en la hejmo de Konfuceo. Ni informiĝis, ke por multe da eksterlandanoj ja estas ĉiela plezuro tranokti tie kaj gustumi speciale preparitajn bongustajn pladojn.

“FARIĜIS ETAJ LA ĈIRKAŬAJ MONTOJ”

La supreniro al Taishan-monto estis la kulmina punkto de nia vojaĝo en Shandong-provinco.


La monto, kies ĉefa pinto — la pinto Ĉiela Reĝo — altas je 1,545 metroj, impone staras en la mezo de la provinco kaj, kiel unu el la kvin famaj montoj de Ĉinio, estas honore titolita “La Orienta Monto”. Cetere, en antikva Ĉinio oni prenis la orienton kiel la lokon, kie ĉio nova ĝermas kaj floras, tial Taishan-monto estas rigardata kiel la krono de la kvin montoj kaj

simbolo de ĉio granda kaj nobla.

La imperiestroj de diversaj dinastioj prenis la monton kiel Dion kaj post sia surtroniĝo kondukis tien la korteganojn por fari kulton. En la jaro 56, kiam Guangwu, imperiestro de la Orienta Han-dinastio (25—220 p.K.), venis tien, li konstruigis montvojon en la antaŭa deklivo, kiu iom post iom fariĝis akso kondukanta de la montpiedo ĝis la supro. Rigardate de la montpiedo, la tuta monto majeste imponas kaj la vojo, kun miloj da ŝtonaj ŝtupoj, aspektas kvazaŭ blanka rubando pendanta de sur la montkapo. Ĉe la fino de la vojo staras la Suda Ĉiel-Portego, envolvita en nuboj, kvazaŭ ĝi efektive estus la enirejo al la ĉiela regno. Tia dispozicio ja estas konforma al la penso de la imperiestroj, kiuj rigardis la supreniron al la monto kiel tiun al la ĉielo. Nun ĉio ĉi aldonas ĉarmon al la monta pejzaĝo. Ni surgrimpis la monton per tiu vojo. De Daizong-arkado, tra la Meza Ĉiel-Portego kaj la Suda Ĉiel-Portego, ĝis la pinto Ĉiela Reĝo, la tuta vojo longas je naŭ kilometroj. Survoje vidiĝas tie kaj tie pavilonoj kaj arkadoj. Ni haltadis por ĝui la belan pejzaĝon inter montoj kaj legi la en-

gravuritajn surskribojn sur ŝtonplatoj, per kiuj la iamaj vizitantoj esprimis sian admiron pri la grandioza monto. Plej peniga estas la montvojo post la arkado Shengxian. Kun kelkcent ŝtonaj ŝtupoj, ĝi aspektas kiel vertikale staranta eskalo. Ĉiu paŝo supren postulas grandan penon. En la pasinteco oni prenis la arkadon kiel dividlinion inter la homa mondo kaj la paradizo. Legendo diras, ke, trapasinte la arkadon, oni tuj diiĝos. Hodiaŭ oni prenas trapason de tiu danĝera montvojo kiel simbolon por montri sian spitemon al ĉiaj malfacilaĵoj. Per tiu vojo ĉiujare pli ol miliono da vizitantoj sukcesas atingi la Sudan Ĉiel-Portegon.

Kiam ni finfine ekstaris sur la montsupro, ni ĉirkaŭprenis per la rigardo la tutan panoramon. La montoj ĉirkaŭe aspektis kiel malgrandaj teramasoj kaj la rivero Wenhe kiel mallarĝa rubando. Iu el ni komencis deklami la versojn de Du Fu, granda poeto de Tang-dinastio en la 8-a jarcento: “Se rigardate de sur via alto, fariĝas etaj la ĉirkaŭaj montoj.” Nur tiam mi vere spertis la ravan ĝuon surgrimpi Taishan-monton.





Stonaj bambuidoĵ

Pejzaĝoj de Xiandu



Fotoj de LI CHUNGENG


La insulo Penglai sur verda akvo





La Lago-rigarda Kiosko






Haoxi-rivero

FOTOJ PRI NATU-
RAJ BELAĴOJ FA-
RITAJ DE E-ISTOJ


de RENATE QUEDNAU (FR Germanio)




Du knaboj ekamikiĝas.



*Frikasitaj
salikokoj*



Ĉinaj pladoj



La roko Gufu apud la rivero Haoxi

TURISMO EN XIANDU

de XUEMEI

EN la pasinta jaro ĉe amiko mi trafis poemaron “Elektitaj Poemoj pri Xiandu” kaj trovis en ĝi version de iu poeto de la 12-a jarcento “Tedite de la Okcidenta Lago, rigardu Dinghu-monton”. Ĉar en Ĉinio troviĝas pluraj lagoj kun la nomo “okcidenta lago”, tial mi demandis mian amikon, pri kiu el la okcidentaj lagoj temas kaj kie estas Dinghu. Li respondis, ke sendube temas pri tiu en Hangzhou, kaj Dinghu troviĝas en la pitoreskejo Xiandu de Jinyun-gubernio, Zhejiang-provinco. Ekde tiu tago min

ĉiam tiklis la deziro vojaĝi al Xiandu por ĝui la belan pejzaĝon de Dinghu-monto.

En iu pluvnebula tago ni atingis la gubernian urbon de Jinyun, de kie aŭte veturinte orienten ĉirkaŭ duonhoron, ni venis al la pitoreskejo Xiandu. Gvidisto Guo diris al ni, ke laŭdire, iun tagon en 749 p. K. de Tang-dinastio, sur la monto Dufeng de la gubernio subite disradiis ruĝa lumo, aŭdiĝis bela muzikaĵo kaj malleviĝis malrapide koloraj nuboj, kiuj ŝvebis ĉirkaŭ la montpinto, ĝis ili iom post iom malaperis en la

profunda nokto. La prefekto raportis tion al la imperiestro. Ĉi tiu admiris: “Ĝi estas loko kie kolektiĝas feoj!” kaj propramane skribis la ideografiajn “Feurbo” (Feurbo en la ĉina lingvo prononcas kiel Xiandu — Trad.) kaj de tiam ĝi ekhavis la nomon. Mi ne tre interesiĝas pri la popola legendo, sed estis magnete allogata de la naturaj pejzaĝoj.

Ĉiuj pejzaĝoj de Xiandu dislokiĝas ambaŭborde de la zigzaga kaj klara Haoxi-rivero. Ni forlasis la aŭton kaj piediris unue al la ĉefa pejzaĝo — Dinghu-montpinto. La

Frikasitaj salikokoj

MATERIALOJ:

salikokoj	750 g.
lardo	50 g.
vino	25 g.
zingibraj pecoj	15 g.

salo	5 g.
blanka sukero	25 g.
Viandsupo (sen viando)	100 g.

PREPARADO:

1. Fortondu la antenojn kaj la piedojn de la salikokoj. Forigu

iliajn intestojn, lavu kaj iom sekigu ilin.

2. Enmetu lardon en la varmigitan paton. Fritu la salikokojn, ĝis ili ruĝiĝos. Spicu ilin per vino, zingibraj pecoj, salo, blanka sukero kaj viandsupo. Kuiru ilin super milda fajro, ĝis la suko fariĝos densa. Kaj tiam metu ilin en pladon.

monto en pluvnebuli aspektas aparte ĉarma. Nebulo leviĝas kaj ŝvebas en la valoj kaj faris ĉion mistere blanka. De intermontaj pasejoj alblovas vento, kiu tiras la pluverojn en sennombrajn klinajn arĝentajn fadenojn, kvazaŭ diafanajn silkaĵojn. En kanto ŝvebante aliras grupo da knabinoj kun floroj en la manoj, de Dinghu-montpinto, kvazaŭ alteriĝantaj feinoj por ekskursi al Xiandu-monto.

Ni promenis sur montovojo sude de la rivero kaj vidis la krutajn montojn rekte starantajn unu post la alia, inter kiuj la plej impona estas Dinghu-montpinto, 375 metrojn super la marnivelo. Ĝi tre similas al elteriĝa bambuido. La legendo diras, ke la prapatro de la ĉina nacio Xuanyuan Huangdi starigis incensujon sur la montpinto por rafini feajn pilolojn. Fininte tion li forflugis, rajdante sur drako. La montsupro estis kavigita de la premo de la incensujo kaj post longa tempo la famo allogis tien multajn literaturistojn, kiuj verkis multe por admiri tiun mirindan spektaklon de la lando.

Laŭ montostreko dekstre de la montpinto ni suprengrimpis al la Lago-rigarda Kiosko sur Buxumonto. Vidate de malproksime, Dinghu-montpinto en pluvnebuli ŝajnis ĉinstila pejzaĝo-pentraĵo. Kaj la monto, sur kiu ni staris, kvazaŭ ligna boato sur senlima maro kaj ankaŭ ni kvazaŭ en fea lando. En tia poezia loko ni aprezis la pejzaĝon kaj atingis la kioskon post pliol-unu-hora grimpado. Starante en la kiosko ni rigardis malproksimen, kie sennombraj rokaj montpintoj staras unuj post aliaj en senlima verda arbaro. La okcidenta Dinghu-montpinto estas kovrita de verdaj pinoj kaj cipresoj dum la orientaj montpintoj kun malsamaj pozoj vekas la fantazion de la turistoj, kiuj revante povas trovi diversajn interesajn kaj naturajn figurojn. Iuj similas al flustrantaj infanoj kaj aliaj al feinoj sin ornamantaj en vento.

En la sekvinta tago ni veturis al alia pitoreskejo "Ferporda Ravino". Ni demetis la ŝuojn kaj ŝtrumpe-tojn, kuspis la pantalonojn, transvadis rivereton ĝis la genuoj profundan. Atinginte alian bordon, ni vidis ravinon inter ferkoloraj krutaj rokmuroj, de kiuj ĝi ricevis la nomon. La ravino estas ĉirkaŭata de montoj kaj en ĝi estas teraso masonita el ŝtonegoj: ruino de antikva literatura studejo, kie ermite studis pluraj famaj erudiciuloj.

Posttagmeze ni venis al alia pitoreskejo — Kaverno de Avo Ni. Legendo diras, ke antikve en montkaverno kun spirala koridoro loĝis iu maljunulo Ni, kiu abomenis trivialaĵojn, evitis la mondon kaj tial eĉ ne lasis sian nomon. En la jaro 759 p. K. la fama kaligrafo de Tang-dinastio Li Bingyang estis nomumita kiel la guberniestro de Jinyun. Estis li, kiu donis al la kaverno la nunan nomon. Sur roko apud la kaverno oni gravuris tri ĉinajn ideografiaĵojn signifantajn "Kaverno de Avo Ni" laŭ la skribaĵo de Li Bingyang. Por protekti tiun ŝtongravuraĵon, oni konstruis super ĝi kioskon. Laŭ vojeto apud lageto ni eniris kaverton, tra kiu ni venis al alia roka kaverno — siatempe la loĝejo de Avo Ni. Ĝi similas al unu ĉambro. Sur la muroj videblas pli ol 40 gravuraĵoj de antikvuloj.

Elkaverniĝinte ni surgrimpis la montpinton. Iom ripozinte, ni venis laŭ vojeto al alia pitoreskejo, la Malgranda Chibi, sur kies kruta muro estas gravuritaj la loknomo kaj poemo faritaj en Song-dinastio. Tie troviĝas kavernoj, krutaj montoj kaj lago, apud ĝi estas insuletoj el groteskaj rokoj. Suprenirinte unun el ili, kaj rigardante foren, ni povas sate ĝui multajn belajn pejzaĝojn.

Veturante sur la revena vojo, mi remaĉis la verson. Jes, la Okcidenta Lago de Hangzhou ja estas ĉarma, sed la natura belo de Dinghu estas same ebriga.

SU MIN:

Gejunuloj

filharmonio

"En alia lando eĉ en unu strato troviĝas pluraj filharmonioj kaj ĥoroj kun malsamaj niveloj. Kial ni ne povas tion organizi por ĝeneraligi la muzikon?!" diris al mi la 27-jara Chen Ping. Simple vestite, li havas seriozan mienon kaj el liaj okuloj vidiĝas revo kaj patoso. Li estas organizanto de la filharmonio Zhongsheng.

La filharmonio estas amatora muzika trupo formita el gejunuloj kiuj havas meznombroan aĝon de 23 jaroj. Ĝiaj direktistoj tutjare laboras sen rekompenco. Du trionoj de ĝiaj muzikiloj estas propraj al ĝiaj membroj, kaj eĉ la kostumoj por prezentado estas preparitaj de la artistoj mem. Krom de negranda subvencio donita de la Kultura Domo de la Orienturba Distrikto la filharmonio havas neniun alian monhelpon. Venkinte diversajn malfacilojn, ĝi jam sukcesis okazigi koncerton kun serio da programeroj post tri monatoj. En pli ol unu jaro post sia fondiĝo, ĝi prezentis pli ol 70 programerojn, inkluzive de "La Kvina Simfonio" de Betoven, kaj pli ol 70 mil aŭskultantoj aprezis ĝian prezentadon.

de la Zhongsheng

Inter ĝiaj membroj troviĝas laboristoj, instruistoj, kemiaj analizistoj, barbiroj, ŝoforoj, kuiristoj . . . Ili loĝas dise en la tuta urbo kaj iuj eĉ en malproksima antaŭurbo.

Se vi venus al ili, vi povus informiĝi pri multaj interesaj detaloj.

Lin Kejun de ĝia ĥoro laboras kiel muzika instruisto en lernejo je ĉ. 150 kilometroj for de la urbo. Por akurate ĉeesti ekzercadon dufoje ĉiusemajne, li devas hasti al la filharmonio tuj post dono de leciono, ne havante tempon reveni hejmen por vespermanĝi. Iafoje kiam la ekzercado finiĝis malfrue, kaj li ne povis reveni per aŭtobuso, li do dormetis en kvieta angulo, kaj frumatene de la sekvanta tago li haste veturis per trajno al sia lernejo por doni lecionon.

Liu Qingbing estas vera maniulo de muziko. Kiam lia edzino naskis infanon posttagmeze, tiuvespere li tamen partoprenis prezentadon same kiel antaŭe, kaj nur post tio li veturis al la hospitalo por flegi ŝin.

Shi Weimin estas juna direktisto de iu kanto-danca trupo.



Post provludo

Post kiam li estis invitita al la filharmonio kiel ĝia direktisto, li ĉiam postulas, ke la membroj prezentu muzikaĵojn laŭ la normoj de profesiaj muzikistoj. Li provludas kune kun ili ĝis profunda nokto kaj hejmen veturas per la lasta aŭtobuso.

“Se vi volas informi pri nia filharmonio, vi devas unue prezenti Chen Ping! Se ne estus li. . .” diris unuvoĉe la gejunuloj. Sed tiu organizanto honteme skuis la manon, dirante: “Estas nenio laŭdinda pri mi.”


Li estas oficisto de la Kultura Domo de la Orienturba Distrikto kaj amas muzikon jam de sia infaneco. Plenuminte sian laboron en la Kultura Domo, li uzas sian tutan energion por trakti ĉiutagajn laborojn de la filhar-

monio, kiel ekzemple okazigo de kunveno, aranĝo de prezentado, atentigo al la membroj pri ordigo de la vestoj antaŭ ilia sursceniĝo ktp. Pro tio oni nomas lin ĉefa administranto de la filharmonio. Liaj amikoj admonis lin forlasi tiujn bagatelojn, opiniante, ke ili estas ne fruktodonaj kaj malŝparas lian junecon. Sed Chen Ping havas sian propran ambicion. Li diris: “Laŭ mia opinio, akiri plian muzikan amatoron por nia trupo signifas, ke ĝi faros plian kontribuon por altigi la kulturon de nia ĉina nacio! Tial ni nepre devas bone funkciigi ĝin.”

La malfaciloj estis por ili multaj. Eĉ en varmegaj tagoj la

(Daŭrigota sur p. 47)

Prof. Zhong Huilan—specialisto pri tropikaj malsanoj



Prof. Zhong Huilan observas specimenojn de paragonimoj.

la supre menciitaj malsanoj plejparte estas jam subpremitaj aŭ reduktiĝis la ofteco de iuj el ili aŭ estas trovitaj efikaj kuracaj rimedoj kontraŭ ili.

Profesoro Zhong verkis pli ol 330 disertaĵojn tradukitajn en la anglan, germanan kaj francan lingvojn, kiuj aperis en medicinaj revuoj de diversaj landoj. La 80-jara profesoro Zhong estas viglanima kaj ankoraŭ gvidadas siajn asistantojn kaj esplorantojn en studo pri tropikaj malsanoj. Antaŭ nelonge li revenis de enketado en suda Ĉinio kaj devis tuj poste veturi al Usono laŭ invito por prelegado. Ĉe lia foriro mi demandis lin, kial li ankoraŭ sin okupas per tiel multaj laboroj en sia granda aĝo. Li diris: “La vivo estas horaro limigita, kaj tamen fari ian kontribuon al la homaro ja signifas longigon de la vivo.”

La infaneco de profesoro Zhong estis pasigita en suferoj. Pro la frua morto de la patro kaj malriĉeco, li komencis viziti lernejon nur en sia 13-a jaro. En 1922 li sukcesis trapasi per eminentaj notoj la eniran ekzamenon de la Unia Medicina Instituto de Pekino. Li diplomiĝis en 1929 kaj gajnis doktorecon. Dum sia diligenta studado en la instituto li ankaŭ

PROFUNDA nokto. En oranĝa lamplumo iu maljunulo rapide skribadas, sin klinante super la tablo. Jen la specialisto pri tropikaj malsanoj profesoro Zhong Huilan. Nun li funkcias kiel estro de la Pekina Instituto de Tropikaj Malsanoj kaj membro de la Biologia Departemento de la Ĉina Akademio de Sciencoj.

Profesoro Zhong laboradis super medicino jam pli ol du-

nan jarcenton. Li akiris bonegajn rezultojn en studo pri la fundamentaj teorioj pri la malsanoj nigra febro (kala-azaro), paragonimozo (latine: *paragonimiasis*), klonorkiozo (latine: *clonorchiasis*), leptospirozo (latine: *leptospirosis*), rekuranta febro, ekzantema tifo kaj malario, kaj atingis rimarkindajn sukcesojn en aplikado de ili al klinika praktikado kaj preventado de tiaj malsanoj. Hodiaŭ

laboradis por akiri iom da mono por la lernopagoj. Li estis forte interesita de la biografio de la fama franca mikrobiologo kaj kemiisto Louis Pasteur. Lin stimulis la vortoj de Pasteur, ke "Eksperimento kaj invento estas du vortoj strikte interligitaj kaj sen eksperimentoj la naturaj sciencoj velkus."

Li decidis sin dediĉi al esplorado pri sciencaj misteroj laŭ la ekzemplo de Louis Pasteur kaj per tio fari sian kontribuon al la ĉina medicino.


En la malnova Ĉinio cirkulis en multaj lokoj nigra febro, ekzantema tifo, malario, pesto, skistosomozo kaj aliaj epidemioj. En 1927, kiam Zhong Huilan studis en la instituto, li jam malkovris, ke kvar specoj de anofeloj povas kaŭzi malariion, kaj li vekis atenton de la medicinaj rondoj per sia disertaĵo "Malgrandaj Anofeloj" verkita laŭ la malkovro.

Sin trovas multaj specoj de tropikaj malsanoj, kiuj turmen-

tas homojn ne nur en la tropikaj regionoj. En tiu tempo cirkulis en norda Ĉinio tropika malsano nigra febro, kies kazoj estis tre oftaj kaj finiĝis per morto en granda procento. Por radikale likvidi tiun malsanon, profesoro Zhong komencis ĝin esplori en 1928, kaj por tion fari li penetris en kamparon malgraŭ ĉiaj malfaciloj. Foje li trovis, ke nelonge post la resanigo de la pacientoj de nigra febro en iu vilaĝo, denove aperis tie novaj suferantoj de la malsano. Tiu fenomeno pripensigis lin. Poste li trovis, ke en tiu loko troviĝas multaj hundoj suferantaj de nigra febro. Ĉu la malsanaj hundoj ne estas la disportantoj de nigra febro? Li komencis pripensi la aferon. Efektive ankoraŭ en la dudekaj jaroj de la kuranta jarcento iuj okcidentaj sciencistoj jam verkis disertaĵojn pri la kaŭzo de nigra febro. Ili opiniis, ke la disvastiĝo de tropikaj malsanoj en Hindio kaj Ĉinio havas nenian rilaton kun la nigra febro de hundoj. Pro-

fesoro Zhong tamen luis kelkajn ĉambrojn en Pekina antaŭurbo kaj bredis tie por eksperimentado dekelkajn hundojn suferantajn de nigra febro. Li metis en la ĉambrojn po unu hundon kaj ĉiuvespere malfermis iliajn fenestrojn por enlasi flebotomojn. Pli ol cent eksperimentojn li faris en tri sinsekvaj someroj kaj konstatis, ke 44.4% ĝis 100% de la enlasitaj flebotomoj estis infektitaj kaj la formo de la patogeno ĉe la flebotomoj estas la sama kiel tiu de la patogeno ĉe la malsanaj hundoj kaj homoj. Ĉu la patogeno ĉe la hundoj povas malsanigi homojn? Por pruvi tion oni devis fari pluan eksperimentadon. Li interkonsiliĝis kun sia edzino, doktorino Li Yizheng, kaj decidis fari eksperimenton al homo. Doktorino Li opiniis, ke profesoro Zhong, foje suferinta de nigra febro, jam havas imunecon kontraŭ tiu malsano, kaj sekve li ne taŭgas kiel objekto de tia eksperimento; ŝi petis, ke la eksperimento estu

Prof. Zhong Huilan kaj liaj asistantoj



farata al ŝia korpo. Kaj la eksperimento pruvis, ke patogeno prenita de hundo kaŭzis nigran febron al doktorino Li. Oni konstatis ankaŭ, ke la patogeno trovita en ŝia medolo estas la sama kiel tiu de hundo suferanta la malsanon. Profesoro Zhong faris pluan esploradon kaj fine eltrovis efikan metodon kontraŭ nigra febro.

En la tridekaj kaj kvardekaj jaroj rekuranta febro kaj ekzantema tifo cirkulis en iuj regionoj de nia lando. En tiu tempo sciencistoj havis du asertojn pri la disvastiga mekanismo de rekuranta febro: 1. la pacientoj de rekuranta febro ricevas la malsanon de la buŝo de mordanta pediko, ankaŭ kies ekskremento povas disporti tiun malsanon; 2. la malsanon kaŭzas leptospiro (latine: *leptospira*) en la homa korpo; kiam ĝi fariĝas nevidebla per mikroskopo, mildiĝas la malsano; sed kiam la supermikra ero ree fariĝas leptospiro, denove aperas la malsanaj simptomoj. Por pruvi la verecon de tiuj asertoj, li kaptis pedikojn de sur paciento de rekuranta febro por sekcado. Li trovis dum sia esploro, ke vere ekzistas granda nombro da leptospiroj en la pedikoj. Sed per atenta observo li konstatis ankaŭ, ke en la saliva glando, salivo kaj buŝo de la pedikoj ne estas leptospiroj. Kaj krome li konstatis, ke en la ekskremento de la pedikoj ne troviĝas vivaj leptospiroj, kaj la leptospiroj en la pedikoj povas infekti nur post kiam la pediko estas rompita. Li eĉ lasis sin mem mordata de pedikoj sed ne estis infektita je la malsano. Tial li opiniis, ke la malsano ne estas disportata de pediko per mordado aŭ de ties ekskremento. Poste li faris esploradon kaj eksperimentojn patologiajn kaj klini-

kajn. Li ekzamenis multajn pedikojn sur kadavro de paciento de rekuranta febro kaj sur vestaĵoj de tiaj malsanuloj agoniantaj kaj esploris la fluidaĵon en tiuj pedikoj. Li trovis, ke leptospiroj troviĝas en ili ĉiuj. Laŭ tio li formis novan teorion, ke leptospiroj troviĝas en la korpoj de la pacientoj de rekuranta febro kaj dum la furiozo de la malsano kaj en la periodo de la mildiĝo de la febro. La mildiĝo de la malsano signifas, ke plejparto de la leptospiroj estas ekstermita de la imuneco aperinta post la malsaniĝo, dum parteto de ili ankoraŭ restas pro nekompleta imuneco, do tute ne estas ia ajn supermikra ero de leptospiroj.

La teorio de profesoro Zhong Huilan estis oficiale agnoskita de internaciaj medicinaj rondoj. La Societo de Tropika Medicino kaj Higieno de Britio invitis lin aliĝi al ĝia organizaĵo kaj la Germana Instituto de Tropikaj Malsanoj petis lin fariĝi ĝia esploristo. Lia teorio estas skribita en lernolibrojn.

Post la fondo de la Popola Respubliko en 1949, la pli-ol-50-jara profesoro Zhong tutkore sin dediĉis al esplorado pri tropikaj malsanoj. Li ofte iris, kun siaj asistantoj, en malproksimajn montregionojn, priesploris lagojn, mem enakviĝinte, kaj vizitis kamparanajn familiojn, malgraŭ ĉiaj malfaciloj kaj penigoj, por fari profundan enketadon kaj esploradon. En iu jaro, en pluraj lokoj de Sichuan-provinco aperis nova epidemio, kies pacientoj sputis sangon, febreĝis kaj suferis de ŝveliĝo de limfoj. Rapide disvastiĝis tiu epidemio en nur kelkaj tagoj kaj teruris la loĝantaron. Iuj medicinistoj suspektis, ke ĝi estas

pesto aŭ eksterordinara gripo. Profesoro Zhong faris esploron pri ĝi en kliniko kaj ĉe la lokoj kaj konstatis, ke la epidemio estas speco de leptospirozo. Dank' al apliko de efikaj medikamentoj, la popolanoj en tiuj lokoj resaniĝis kaj liberiĝis de la minaco de tiu malsano.

Profesoro Zhong estas tre atentema sciencisto. Foje li rimarkis dum sia esplorado en regiono loĝata de nacimalplimulatoj en Yunnan-provinco, ke multaj kamparanoj kraĉas sangon. Per laboratoria ekzameno li trovis, ke en ilia kraĉaĵo estas granda kvanto da ovoj de paragonimo. Por koni la kaŭzon de la sangokraĉado, li vizitis multajn kamparanajn familiojn. Foje dum manĝo oni surtabligis teleron da saŭco el muelitaj kraboj. Post pridemando li informiĝis, ke la lokanoj ŝatas manĝi tian saŭcon el nekuiritaj kraboj, kiuj portas grandan kvanton da paragonimidoj kaj povas kaŭzi malsanon. Li helpis la lokan registaron fari propagandon pri sanoprotekto kaj samtempe komencis rapidan kuracadon per efika medikamento nove eltrovita.

De multaj jaroj la profesoro faris kun siaj asistantoj enketadon kaj esploradon, migrante de loko al loko tra ebenaĵoj kaj montregionoj de duono de nia lando, kaj iris pli ol kvindek mil kilometrojn. En la lastaj jaroj li eltrovis eksterordinaran diaĝnozan kaj preventan metodojn kontraŭ paragonimozo, klonorkiozo kaj nigra febro. Ĉiuj tiuj fruktoj de lia esplorado troviĝas en lia baldaŭ finota verko "Tropika Medicino".



ĈINA-JAPANA AMIKECA HOSPITALO EN KONSTRUO

La konstruado de moderna hospitalo komenciĝis en Pekino la 2-an de decembro 1981, en kunlaboro de la ĉina registaro kaj la japana registaro, kiu donace liveris helpan fonduson. Laŭplane la tuta konstruado kompletiĝos en la jaro 1984.

La hospitalo kun plankareo de 83 mil kvadrataj metroj sidas ĉe la norda fino de Heping-strato. La hospitalo faros kuracadon, instruadon kaj sciencan esploron kun la ĉina kaj eŭropa medicinoj en kombino. La hospitalo havos mil malsanulajn litojn kaj dek kvar fakojn, kaj ĝia ambulatorio akceptos ĉiutage dumil pacientojn. Krome, en la hospitalo troviĝos unu klinika instituto kun ses esploraj sekcioj de biokemio, farmacio, patofiziologio kaj aliaj, unu resaniga domo kun tricent litoj kaj unu flegistina lernejo kun tricent lernantoj.

La flegistina lernejo de la hospitalo jam fondiĝis en 1980 kaj nun havas 220 lernantojn. La lernotempo estas tri jaroj.

“PLENA VERKARO DE LUSIN” ESTOS TRADUKITA KAJ ELDONITA EN JAPANIO

La 7-an de decembro 1981, la Popola Literatura Eldonejo de Ĉinio kaj la Studa Eldonejo kaj la Aŭroro Eldonejo de Japanio subskribis en Pekino kontrakton pri tradukado kaj eldonado de la “Plena Verkaro de

Lusin” nove kompilita en Japanio. Laŭ la kontrakto la “Plena Verkaro de Lusin” en la japana lingvo el 21 volumoj komplete eldoniĝos en 1984, kaj la unua volumo aperos en aprilo 1983.

JUGOSLAVIO PREMIIS DU ĈINAJN TABLOTENISAJN TREJNISTOJN

Ĉinaj tablotenisaj trejnistoj geedzoj Chen Baoqing kaj Huang Xiping gajnis “Vojvodinan premion por sporta merito”, kiu estas la plej alta sporta premio de la Vojvodina aŭtonoma provinco. La geedzoj venis al Jugoslavio en januaro 1980 por trejnado laŭ la invito de la Vojvodina Sporta Klubo de Jugoslavio. Ili akiris vastan laŭdon de jugoslavaj amikoj pro sia aktiva, konsciencia, serioza kaj detalema laboro dum la pasintaj du jaroj.

KUNA PREZENTADO DE FILI- PINA DIREKTISTO ROMERO KAJ ĈINAJ MUZIKISTOJ

Redentor Romero, honorita kiel unuaklasa internacia direktisto de la Filipinoj, faris kuman prezentadon kun la Centra Filharmonia Orkestro en Pekino decembre de 1981.

En la koncertoj donitaj en Pekino, Romero sukcese direktis la orkestron en ludo de komponaĵoj de Verdi, Betoveno kaj Mozarto kaj lia fama reprezenta verko “Filipina Portreto” komponita en 1976. Lia arto rikoltis varman aklamadon ĉe la aŭskultantoj.

ĈINAJ AKROBATOJ EN LA MONDA AKROBATA FESTIVALO

Yang Liu, Wang Zhenggang kaj Guo Chaoying de la Ĉina Akrobata

Trupo de Chongqing prezentis du eminentajn tradiciajn programerojn “Ekvilibriĝo de Vazego” kaj “Piedjonglado de Vazego” en la Monda Akrobata Festivalo je la 14-a de decembro 1981. Ilin invitis la Princo de Monako post sia rigardo de ilia prezentado en Francio. Yang Liu kaj Wang Zhenggang gajnis “Pokalon de la Cirka Klubo de Svislando” pro sia programero “Ekvilibriĝo de Vazego”.

La Monda Akrobata Festivalo okazas ĉiujare sub la aranĝo de la Komitato de Akrobata Arto de la Princlando Monako. En 1980 akrobataĵoj de pli ol dudek landoj prezentigis en la festivalo.

PEKINA ENSEMBLO EN PARIZO

Laŭ oficiala invito la Pekina Ensemblo de Ĉinio venis al Parizo decembre de 1981 por vizito kaj prezentado. Ili faris 600 prezentojn en la Granda Teatro de Parizo dum du monatoj. La geaktoroj esprimis, ke ili faros kontribuon por plifirmigi la amikecon alte taksatan de la ĉina kaj franca popoloj kaj akceli la kulturalan kaj artan interfluan inter la popoloj de la du landoj.

KANTONO KAJ LOS-ANĜELESO LIGIĜIS KIEL AMIKAJ URBOJ

Lian Linguang, urbestro de Kantono, Ĉinio, kaj Thomas Bradley, urbestro de Los-Anĝeleso, Usono, subskribis interkonsenton pri ligo de Kantono kaj Los-Anĝeleso kiel amikaj urboj, la 8-an de decembro 1981 en Los-Anĝeleso. En la subskriba ceremonio ambaŭ urbestroj esperis, ke surbaze de la starigo de amikaj rilatoj, pluapase disvolviĝos la interŝanĝo kaj kunlaboro inter la du urboj en la kampoj de komerco, kulturo kaj edukado.

Aŭtuno en la printempo

*mallonga romano
pri amhistorio de juna
paro en la malnova Ĉinio
verkita de*

Ba Jin



*fama ĉina verkisto kaj veterana esperantisto
prezidanto de la Asocio de Ĉinaj Verkistoj
vicprezidanto de la Ĉina Esperantot-Ligo*

esperantigis Laŭlum ilustris Yao Youxin

148 × 210mm. 116 paĝoj numero: 10-Es-1525

prezo: bros. £2,40 US\$4,90 bind. £2,90 US\$5,90

**Mendu ĉe: Libroservo de UEA, peranto de EPC
aŭ Esperanta Sekcio de la Centro de
Ĉinaj Eldonaĵoj (GUOJI SHUDIAN),
P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio**

SILKA PORTRETO DE D-RO ZAMENHOF

Eldonis Ĉina Esperanto-Ligo

Formato: 28 × 42cm. Prezo: 9,00 gld.

(Triona rabato por la aĉeto de tri ekzempleroj)



**Mendu ĉe:
Libroservo de UEA
aŭ Ĉina
Esperanto-Ligo,
P.O. Kesto 77,
Beijing, Ĉinio**

Fonto

kiu per sia unua jarkolekto (oktobro 1980 — septembro 1981) firme establiĝis kiel la beletra revuo de la okdekaj jaroj. **Redaktoro: William Auld.** Aperas ĉiumonate: 12 ilustritaj kajeroj, po 44p. jare.

Enhavo de la unua jarkolekto: 40 originalaj noveloj, 29 tradukitaj noveloj (el 9 lingvoj), 108 originalaj poemoj, 143 tradukitaj poemoj (el 25 lingvoj), 2 teatraĵetoj kaj 3 longaj recenzoj.

Abonojn por la 2a jarkolekto akceptas la Libroservo de UEA. Prezo: 39,00 gld. (plus 4%, nur por nederlandaj klientoj).

Eldonisto:

Gersi Alfredo Bays

Caixa Postal 49

BR-89800 Chapeco (SC)

Brazilo

Fonto

FIŜADO SUB GLACIO

Fotoj de LIU XIANGYANG

En Heilongjiang, la plej norda provinco de Ĉinio, ĉiuvintre glaciĝas la surfaco de la riveroj kaj lagoj. Tamen la fiŝoj libere vivas sub la glacia tavolo. Tiam estas favora sezono por fiŝado. En la temperaturo de 30°C sub la nulo la fiŝistoj rompas glacian, jetas reton en akvon kaj kaptas fiŝojn por liveri al la merkato.

Kaptitaj fiŝoj





Antaũ levo de reto



Maljuna fiŝisto

Antaũ fiŝado



Ĉina entomologo

prof. Io Chou


Prof. Io Chou, konsilanto de la Ĉina Esperanto-Ligo, estas fama ĉina entomologo. Li fervore disvastigis Esperanton en la pasintaj 50 jaroj. En siaj fruaj jaroj li redaktis la monatan ilustritan gazeton de ĉina entomologio "Insekto Interesa" kaj "Bulteno de Asocio de Insekta Intereso", kies kovriloj estis presitaj en Esperanto. Poste li kaj alia esperantisto Lu Jinsheng redaktis la revuon "Entomologio Ĉina" kaj "Entomotaxonomia", en kiuj parto de la artikoloj estas kun mallonga Esperanta traduko. En la tridekaj jaroj li korespondis en Esperanto kun sovetunia genetikisto I. V. Miĉurin kaj japana entomologo Esadi Teiso por interŝanĝi sciencajn informojn. Nun li korespondas kun pli ol 50 sciencistoj de 15 landoj. En 1980, kiam li partoprenis en entomologia konferenco en Japanio, li vizitis Zamenhof-Klubon en Tokio.

Prof. Io Chou, lia edzino Lu Jing kaj lia asistanto Lu Jinsheng observas insektajn specimenojn.

Io Chou en Zamenhof-Klubo en Tokio



Prof. Io Chou



Prof. Io Chou kaj liaj kolegoj de
"Entomotaxonomia"



Kolektado de insektoj por specimeno



Prof. Io Chou kaj usonaj gastoj Ralph A. Lewin kaj lia edzino Lanna Cheng



Ĝenro pri la evenkoj

de PENG BIAN

LA evenkoj loĝantaj en arbaroj profunde en la Granda Xing'an-montaro de nordorienta Ĉinio sin vivtenadas per ĉaso. Antaŭ la Liberiĝo ili migradis tutjare en primitivaj arbaroj, paŝtante rangiferojn kaj ĉasante sovaĝbestojn. Iliaj loĝejoj estis simplaj budoj kun framo el 36 maldikaj pinaj trunkoj kovrita per feloj aŭ betulaj ŝeloj en formo de ombrelo. La budojn ili devis malkonstrui por plua migrado, post loĝado dum 3-10 tagoj. Ili vivis tre mizere. Pro praktiko de genocida politiko fare de la regantoj kaj furiozado de malsanoj, la evenka popolo estis minacata de pereco.

Kiel nun vivas tiu popolo 32 jarojn post la Liberiĝo? Kun tiu demando mi vizitis evenkojn loĝantajn en arbaroj de la Granda Xing'an-montaro. En neniuj el la vizititaj lokoj mi vidis la tradician simplan budon, anstataŭe aperis apud riveroj sur montodeklivoj tegoltegmentaj brikodomoj. Kvankam tiu popolo nun jam fiksloĝiĝis, tamen ĝiaj membroj ankoraŭ daŭrigas sian propran kutimon de ĉasado.

La evenkoj estas tre gastamaj kaj rigardas viziton de gasto kiel ĝojindan aferon. Kiam mi venis en la domon de maljuna ĉasisto Bjedobu, la mastro tuj sidigis min sur felan kusenon, kaj respektplene prezentis al mi tabakon por fumi. Iom poste, la mastrino portis al mi per arĝenta pleto aroman vinon el sovaĝaj fruktoj, kuiritan cervajon, sukeritan brunan teon kaj kukojn. Maljuna Bjedobu plenigis glason per vino, unue verŝis iomete da vino en la fajron, poste mem prenis buŝplendon da ĝi kaj donis la glason al mi, por ke mi trinku por refreŝiĝo.

Samtempe kun tio, la mastrino detranĉis peceton da viando, ĝin ĵetis en la fajron kaj poste detranĉis plenan teleron da grandaj viandpecoj kaj tiam prezentis ĝin al mi. Mia gvidisto jam antaŭe atentigis min, ke tro ĝentila sindeteno de manĝo kaj trinko fare de gasto povas malkontentigi la mastron, tial dum la regalado mi manĝis kaj trinkis tute senĝene kaj baldaŭ jam tiel amikiĝis kun la mastro, ke ni kore kaj libere interbabilis.

“Kial verŝi vinon en la fajron?” mi demandis scivoleme al avo Bjedobu. Li diris al mi, ke la fajro estas ial rigardata de la evenkoj kiel dio. Oni diras, ke ili respektas la fajron pli multe ol siajn prapatrojn,

kaj la edziniĝontaj knabinoj devas unue riverenci al fajro kaj poste al la prapatroj. Kiam novedzino unuafoje revenas al siaj gepatroj por ilin viziti, la parencoj devas iri eksteren kun torĉoj por ŝin bonvenigi kaj la novedzino devas unue transpaŝi fajron kaj poste eniri en la domon de siaj gepatroj.

En nia lando nur la evenkoj bredas rangiferojn, kaj la multeco de iliaj posedataj rangiferoj montras ilian riĉecon. Per siaj larĝaj hufoj la rangifero povas longe marŝadi en arbaro aŭ sur neĝo, portante sur si ĉasaĵojn aŭ tirante glitveturilon. Ĝia viando estas bongusta, ĝia felo taŭgas por fari vestojn kaj



Tagmanĝo de ĉasistoj



Evenkoj sledas por viziti parencojn aŭ vendejojn en frosta vintro.

ŝuojn kaj ĝia korno estas valora drogo.

La evenkaj viroj sin okupas per ĉasado, dum la virinoj per mastrumado. Kiam la viroj foriras por ĉasado, iliaj patrinoj, edzinoj, fratinoj kaj filinoj ilin adiaŭas kantante laŭ antikva moro. Per sia bela kantado ili deziras al la ĉasistoj bonan vojaĝon kaj grandan sukceson.

La evenkaj ĉasistoj bonege konas la montojn kaj arbarojn en sia loko kaj same ankaŭ la kutimojn de la sovaĝaj bestoj. Per pririgardo de spuroj ili povas ne nur scii, ĉu ili apartenas al neĝa kapro, bruna urso, ruĝa cervo, kapreolo k.a., sed ankaŭ certiĝi, ĉu la besto estas vira aŭ ina, ĉu ĝi kuras surprizite aŭ iras senĝene. Ili ĉiuj estas lertaj pafistoj kaj ĉiam pafas trafe. La ĉasaĵojn ili tuj senfeligas, dispecigas kaj metas en 16 amasojn, ĉirkaŭ kiuj estas metitaj kuglingoj odorantaj je pulvo, por gardi la ĉasaĵojn de lupoj. Post la fino de la ĉasado, la virinoj estas senditaj al la ĉasaĵoj por ilin hejmen porti per rangiferoj.

La evenkoj havas tradician kurtimon konstrui tenejon sur arbo. Tia tenejo ordinare longa je 5 metroj, alta kaj larĝa je 3 metroj similas al granda ligna kesto kaj troviĝas 15 metrojn super la tersurfaco. La evenkoj nomas ĝin "tenejo en aero". Ĉe unu flanko de tia tenejo troviĝas fosto kun entranĉitaj ŝtupoj, kiu servas kiel ŝtupetaro por faciligi grimpadon de homoj al la tenejo. En tiaj tenejoj la evenkoj konservas rangiferan kremon, ursograson, cervokornojn,

moskojn, ursoplandojn, felojn de lutroj kaj zibeloj, lanon de neĝkaproj k.s. Avo Bjedobu diris al mi, ke la evenkoj tute ne scias la nocion de "ŝtelo", kaj se al preterpasantaj ĉasistoj mankas manĝaĵo, ili rajtas mem preni manĝaĵon el tia tenejo sen permeso de la mastroj. La tenejoj estas konstruitaj en tia alteco nur por ilin gardi de ursoj. Oni diras, ke la ursoj estas lertaj en arbogrimpado, sed ne en malsupreniro. Ili do devas lasi sin fali de la arbo, kiel ajn alte ili grimpis; tial la ursoj povas nenion fari kontraŭ tia alta tenejo, krom murmurado kaj salivado.

Tagmeze la mastrino Madulu preparis riĉan manĝon por min regali: fritita alkajo, kuirita kapreola femuro, cervotendeno fritita kun orefungoj, vaporumita ursoplando, pasteĉo el apraĵo, fraga konfitaĵo, rangifera kremoj k.a. Mi neniam antaŭe havis tian festenon ĉe ĉasisto kaj gaje interbabilis kun la gemastroj, trinkante sovaĝfruktan vinon gustoriĉan.

Nuntempe la aĉetoprezoj difinitaj de la ŝtato estas raciaj kaj pro sia granda enspezo la evenkoj vivas riĉe. Anstataŭ ursaj aŭ apraj feloj, nun silkaj vatitaj kaj altvaloraj lanaj litkovriloj estas uzataj en iliaj domoj. Ĉiu familio havas kudromaŝinon, radioricevilon, teleskopon, modernajn ĉaspafilojn kaj sufiĉe grandan kvanton da kugloj. La gejunuloj preferas lanajn aŭ poliesterajn vestojn, dum la maljunuloj aŭ mezaĝuloj ankoraŭ ŝatas la tradiciajn felovestojn. Ekzemple avo Bjedobu portas rondan ĉapon el

linkofelo, jaketon el moskocervafelo kaj pantalonon el kapreolafelo, tigrofelan zonon ĉirkaŭ la talio kaj longajn botojn el ursofelo. Kaj tiujn elegantajn vestaĵojn lerte faris lia edzino kaj filino per fadejoj el alkotendenoj.

Estas interese, ke la evenkoj uzas rangiferojn kiel doton. Okaze de geedziĝo, la familioj de la novgeedzoj donacas unu al la alia egalnombrajn rangiferojn por la parenცი. Vespere de geedziĝa festo la gastoj ĝoje dancas kun la novgeedzoj man-en-mane ĉirkaŭ brila kampofajro ĝis tre malfrua horo; kaj oni dume kantadas jenan antikvan kanton por esprimi sian koran bondeziron al la nova paro:

Senfinan feliĉon al nova la paro!

Vi, novaj geedzoj, tenu en memoro:

Al orfoj, soluloj vi helpon ne ŝparu,

kaj multe vi ŝvitu en via laboro.

Pro tia laboro kaj tia bonfaro,

vi havos grandegan rangiferegion,

kiu per irado levos polvnubegon.

Pro sia longa izoliteco la evenkoj kreis originalan kulturen vivon. Post sukcesa ĉasado la ĉasistoj faras kampofajron, ĉirkaŭ kiu ili sin regalas per bongustaĵoj, kantas kaj dancas kun senkompara ĝojo. Kaj en liberaj horoj la evenkoj ofte kolektiĝas por aŭskulti belajn fabelojn, fablojn kaj interesajn rakontojn, aŭ divenas enigmojn. Oni ankaŭ faras tradiciajn ludojn kiel "ĉasado de bruna urso" aŭ "translokiĝo de rangiferoj". Pli viglajn aktivadojn faras la gejunuloj, kiuj ŝatas naĝi kaj fiŝokapti per bastonoj, remante sur floso aŭ boato el betuloŝeloj en somero kaj skii aŭ tiradi sledon konkurse en frosta vintro aŭ sin ekzerci por fariĝi lertaj kaj bravaj ĉasistoj.

Sepstela Kolĉeno

(Novelo)

MI informiĝis de mia amiko, ke la Sepstela Vilaĝo, foirejo de la naŝia popolo, fariĝis denove prospera kaj movoplena. Je mencio de la vilaĝo mi vole-nevole ekmemoris pri kolĉeno sepstela, kiu forte premis mian koron. Mi decidis iri tien rigardi.

Tiun tagon mi biciklis tra kamparo, kaj kiam mi estis atingonta arkan ŝtonponton ĉe la vilaĝo, mi subite vidis antaŭ miaj okuloj moviĝantajn bruajn homamasojn. Aŭdiĝas ankaŭ krioj de kokoj kaj anasoj. Mi metis mian biciklon antaŭ butikon ĉe riverbordo, de kie mi iris inter interpuŝiĝantaj homoj kaj tiel venis al bazararo. La suda stratrando estis abunda je freŝa porkaĵo, sekigita viando, bovajo kaj ŝafajo en grandaj pecoj, karnodika urŝaĵo kaj malgrasa kapreolajo. Subite iu virino en ŝaffela jako kaptis min ĉe brako, dirante: "Aĉetu bukedon, kamarado!" Mi direktis rigardon al ŝia bambua korbo kaj vidis tie kvin kokojn malsupre kaj disvolviĝantajn kameliflorojn supre. Mi volis aĉeti ion post trarigardo de la tuta foiro, mi do danke rifuzis ŝin. Ŝi lasis min kaj pririgardis min de la kapo ĝis la piedoj. Mi ne donis atenton, sed antaŭenpuŝiĝis plu. Mi venis al fiŝbazararo kaj vidis diversajn kuvojn kaj korbojn unu apud alia kun ruĝvostaj karpoj, blankaj karpoj, karasoj, salikoketoj k.a., kaj iujn fiŝojn eĉ saltetantajn en pesiltaso. Kaj legombazararo abundis je

taro, lilioj, batatoj, lotusradikoj, sagitario, sekaj fungoj kaj ignamo. En la meza parto de la strato estis bazararo de kortobirdoj kaj ovoj, la plej movoplena bazararo. Tie kluksis sennombraj kokoj, anasoj kaj hejmkolomboj, blekis ankaŭ hundetoj kaj katetoj. Mi haltis antaŭ maljuna vendanto kaj prenis el lia korbo kokinon kun plurkolora plumaro. Ĝuste kiam mi volis ĝin esplori, neatendite mia brako estis denove kaptita de iu. Mi turnis la kapon kaj vidis neniun alian ol tiu sama virino en la ŝaffela jako.

"Kion vi intencas?" mi turnis nekomprenan rigardon al ŝi. Ŝi levis la palruĝan vizaĝon kaj dolĉe ridis: "Mi ne eraras, ĝuste estas vi!"

"Ĉu vi...?" mi tute konfuziĝis.

Ŝi malligis la ledan ŝnuron sur sia ruĝvelura veŝto, demetis la korbon de sur sia dorso, flankenigis la florojn de sur ĝia supraĵo, elprenis grandan kokon kun fazaneca plumaro kaj insiste ĝin metis en mian korbon. Ŝi ankaŭ enmanigis al mi bukedon da freŝaj floroj, dirante: "Kiel forgesema vi estas! Ĉu bone kreskas via knabineto, kiu preferas terpomon?" Leginte dubon sur mia vizaĝo, ŝi daŭrigis: "Ĉu vi memoras la virinon, kiu foje mamnutris vian infanon antaŭ dek jaroj?" Ah, mi ekstuporis, mi tuj formetis la flaron kaj forte kaptis ŝian manon: "Estas vi, fra... franjo! Ho, vi havas tute alian aspekton!"

Iun malfruaŭtunan tagon ĝuste sur tiu ŝtonplata strato ŝi sidis en ĉifona ŝaffela jako kun interplektitaj kruroj, kun bebo mamsuĉanta en la sino. Antaŭ ŝi estis dek kokovoj sur ŝia malnova koltuko sur la tero. Ŝi havis palan ovalan vizaĝon kun alta nazo kaj nigraj okuloj sub la arkaj brovoj. Ŝi aspektis marasma. Ŝi tenis la bebon per unu brako kaj per la alia senĉese karesis malgrandan arĝentan, tre delikatan kolĉenon ĉirkaŭ ĝia kolo. Por kokovoj mi iris tien kaj reen plurfoje sur la strato. Sed estis neniuj ovovendantoj krom tiu virino. Mi refoje kaŭriĝis antaŭ ŝi, levis unu, ĝin proksimigis al mia orelo kaj ekskuetis. Vidinte tion, ŝi sulkis la brovojn, jetis okulojn al mi kaj diris kolere: "Pro kio vi malkontentas pri tiuj ĵus demetitaj ovoj?" Mi tamen ne atentis ŝiajn vortojn kaj diris: "Franjo, mi ofte aĉetas ovoj surstrate. Viaj ovoj ne estas tiel freŝaj." Ŝi palpebrumis, kaj maldolĉa rido ekaperis sur ŝiaj buŝanguloj: "Ĉu ilia koloro ne estas brila? En mia hejmo estas ovokaŝema kokino kun fazaneca plumaro. Tiujn ovoj ĝi kaŝis en sia pajla nesto nur kelkajn tagojn pli longe. Se vi volas, prenu ilin ĉiujn. Ili ja ne estas gemo aŭ agato, kial necesas senfina elekto?" Mi stariĝis heziteme. Ŝi okulpafis kaj mokis min: "Ne mankas mono al vi salajruloj. Vi atendu ovoj de ĉiela kokino!" Kaj ŝi levis la okulojn al la ĉielo. Subite ŝia voĉo fariĝis melankolia: "Ve! Se



*“Mi ne eraras,
ĝuste estas vi!”*

la infano ne estus malsana, mi domaĝus doni mian gemon kontraŭ papermono!”

Nur tiam mi rimarkis skelete marasman infanon en ŝia sino. Inter ĝiaj plorantaj lipetoj elrigardis du laktodontoj kiel rizgrajnoj. Senĉese ploris la kompatinda etulino, kies piedetoj kaj manetoj moviĝadis sencele. La virino dolore zumadis por ŝin kvietigi kaj kisadis jen ŝian malgrandan frunton, jen ŝian mentonon, sed tio ankoraŭ ne povis ĉesigi ŝian ploradon. Estas mirinde, ke la knabineto tuj ĉesis plori, kiam la virino prenis la malgrandan kolĉenon kaj ĝin milde svingadis al ŝi kaj du arĝentaj fiŝetoj sur la kolĉeno sonadis ĉe frapado. La etulino jam kaptis ĝin per amabulaj manoj, ĝin metis al la buŝo kaj ekmordis sen spirhalto. En tiu momento la virino rapide formovis la kolĉenon kaj metis sian mampinton milde en ŝian buŝeton, kaj nur tiam kvietigis la etulino, kiu mamsuĉadis soife. La virino mallevis sian kapon kaj milde forlekis la larmojn sur ŝia vi-

zaĝo. Poste ŝi rigardis jen la sunon, jen vojirantojn, jen la nevenditajn ovojn sur la koltuko. Larmoj elruliĝis el ŝiaj okuloj. Korpremate mi demandis ŝin: “Je kio ŝi estas malsana? Ĉu vi aĉetos por ŝi medikamenton?” “Unue ŝin trafis lakso, poste eble konvulsio. Nokte ŝi ploras multe pli forte ol tage,” ŝi respondis obtuze kaj samtempe ekzamenis per manplato ĝian frunteon. “Ŝi ankoraŭ febras. Kiel maltrankviliga estas!”

“En kiu vilaĝo vi loĝas?” mi demandis.

“Tre malproksime. Ni venis piede de Yulong-monto. Apenaŭ tagiĝis, kiam ni eldomiĝis.”

Mi tremis en la koro kaj denove kaŭriĝis: “Ĉiujn tiujn mi aĉetas,” kaj mi pagis laŭ ŝia postulo.

Mi forlasis la vilaĝon kaj direktis min al malsanulejo. Ankaŭ ŝi tien iras. Dumvoje ŝi subite demandis min mallaŭte: “Kio? Ankaŭ vi estas malsana?” “Mia filino rice-

vas kuracadon en la malsanulejo,” mi respondis. “Vi salajruloj facile solvas viajn problemojn, sed por ni vilaĝanoj trovi moneron estas pli malfacile ol pluki stelon,” ŝi diris.

Mi ne sciis kion diri. Mi plendis: “Mia knabineto estas pli kompatinda ol la via. Mankas al ŝia patrino lakto kaj laktopulvoro estas malfacile akirebla, tiel ke ni nutras ŝin nur per ova supo kelkajn fojojn ĉiutage.”

Dume venis renkonte maljunulo portanta korbon kun delikataj terpomoj, kiujn la naŝioj nomas “ovoterpomoj” (ĉar ili similas al kokovoj.) Pro la prefero de mia infano mi tuj haltigis lin kaj aĉetis la tutan korbon da terpomoj. Atinginte la malsanulejon, mi denove tremis en la koro. Ĉe la monpagejo larmis la virino staranta kun sia bebo ploranta kaj krianta en la brakoj. Iu laboranto kun buŝŝirmilo konsolis ŝin: “. . . ĉu vi ne povas turni vin al iu konato por peti helpon? La injektaĵo estas nepre necesa. Vidu, la infano jam perdis korpajn fluidojn.” “Mi petas ŝanĝi la injektaĵon. Kie en la urbo mi povus trovi konaton?” Dirinte, ŝi distris la infanon per la kolĉeno, kaj tiu kaptis ĝin per siaj manoj kaj ĝin ekmordis. La homo kun buŝŝirmilo milde karesis la vizaĝon de la knabineto kaj diris: “Vidu, ŝiaj laktodontoj ion avidas. Kion vi manĝigis al ŝi?” La virino viŝis larmojn kaj respondis per tremanta voĉo: “Nenion krom mia malgrasa lakto.” “Necesas ankaŭ io alia. Estas naŝia popoldiro ‘Infano sane kreskas ne nur dank’ al lakto, sed ankaŭ kaj pli grave dank’ al aliaj nutraĵoj.’” “En la hejmo ni havas nenian manĝaĵon por ŝi. Hodiaŭ mi vendis kelkajn subtaksitajn ovojn, tamen la mono ankoraŭ ne sufiĉas por ŝin kuraci,” ŝi diris kaj tuj levis la kolĉenon, kaj paro da ŝiaj larmoplenaj okuloj subite ekbrilis mirige. “Ha, atendu momenton, mi ĝin vendos!” La homo kun buŝŝirmilo tuj haltigis ŝin: “Tion ne faru. Fermiĝis la proksimaj butikoj de

arĝentajoj, de kiam oni malpermesis la ekziston de 'malnovaj moroj'. Mi proponas, ke vi faru ŝuldateston. Mi demandos tion por vi." Kaj li foriris. La virino sin turnis, rimarkis min apude staranta kaj ekretemis de surprizo. Mi haste demandis ŝin: "Kiom vi ankoraŭ bezonas, franjo?" Ŝi silente turnis la vizaĝon flanken. Fulme leginte pagofolieton en ŝia mano, mi tuj elpoŝigis kelkajn monbiletojn kaj donis ilin al ŝi. Post tio mi iris al la domo por pacientoj.

Post ĉirkaŭ kvaronhoro denove aperis antaŭ mi la virino kun la bebo sur sia dorso. "Kio? Ĉu ankaŭ ŝi bezonas enhospitaliĝi?" mi demandis ŝin nekomprene. Ŝi kapneis kaj kaptis min je brako, dirante: "Pardonu! Tiuj ovoj estas ne-manĝeblaj por la infanoj." Ŝi proksimiĝis al la lito kaj rigardis mian infanon, dirante: "Ankaŭ malgrasega! Veku ŝin, kaj mi nutru ŝin per mia lakto!" "Ne, ne! Tion ne faru!" Sed ŝi jam prenis mian knabineton en siajn brakojn. Ŝi malbutonumis sian veston, prenis malsekan mantukon ĉe la lito, viŝis sian mampinton kaj komencis ŝin nutri. Anstataŭ suĉi ŝian mamon, la knabineto skuis sian kapeton. La virino milde frapetis la infanon, dirante: "Ne timu! Mia mammo estas pura. La malsano de mia infano ne infektos vin, tion kuracisto ĵus diris, suĉu do sate!" Mia knabineto estis nur okmonata kaj ne timis fremdulojn. Ŝi malfermis la buŝeton kaj eksuĉis. Ekaperis feliĉa rido sur ŝia plaĉa vizaĝo. Sed post nelonge mia infano elbuŝigis la mampinton kaj ekploris. Tio ĉagrenis la virinon, kiu sulkis siajn arkajn brovojn. Ŝi diris: "Mia malgrasa lakto ne plaĉas al vi, ĉu? Ve. . ." Mi tuj klarigis: "Franjo, ŝi ne kutimas, ĉar ŝi neniam gustumis la homan lakton." Kaj mi prenis la infanon en miajn brakojn.

"Kiel bone estus, se lakto ne mankus al via edzino! Sed la problemo estos facile solvebla por vi salajruoj." Subite ŝi turnis rigardon al

mia retsako pendanta ĉe angulo de la ĉambro, timtremis kaj ripetis: "Tiuj ovoj estas manĝeblaj por vi plenkreskuloj, sed neniel por infanoj. Mi ne diris al vi, ke mi iam metis ilin al kovado. Neatendite, la malsano de mia infano graviĝis kun ĉiu tago, sed al mi mankis mono por viziti kuraciston. Post kovado de dek tagoj mi elnestigis la ovojn por ilin vendi. Diru al mi, kie vi laboras. Kiam ni havos facilan vivon ni rekompencos vin."

Malsekiĝis miaj okuloj. Mi remetis la infanon sur la liton, elprenis la dek ovojn kaj redonis ilin al ŝi: "Ne ĉagreniĝu, franjo. Ni ambaŭ devas zorgi pri infano, sed mia situacio estas pli bona ol la via. Ne premetu la ovojn en la neston. Kiel bone estos, se kokidoj elrampos el tiuj ovoj!" Ŝi rifuzis foje-refoje, mi insiste petis ŝin repreni ilin, kaj fine ŝi foriris viŝante larmojn el la okuloj.

La sekvan tagon mi rimarkis tiun malgrandan sepstelan kolĉenon sub la kapkuseno de mia infano. Mi tenis ĝin en la manoj kaj longe ne povis kvietiĝi. Mi atente observis la kolĉenon, kiu similis al aĵura arĝenta floro. Sur ĝia antaŭo sep steloj

estis inkrustitaj per verdaj ŝtonetoj; sur ĝia dorso du malgrandaj arĝentaj drakoj ludas rubenan globon, sub kiu estis la inkrustitaj vortoj "riĉeco" kaj "gloro". Sur la kolĉeno pendis du arĝentaj fiŝetoj. Ĝin nerimarkite deprenis la virino de sur la kolo de sia infano kaj metis sub la kapkusenon de mia infano. La ĉitieaj loĝantoj nomas la sepstelan kolĉenon "kolĉeno de riĉeco kaj gloro" aŭ "kolĉeno de longa vivo" kaj por beni la infanon ili metas ĝin ĉirkaŭ ties kolon. Nun la virino donis al mia infano la sepstelan kolĉenon, kiun ŝia infano kutimis palpadi kaj mordadi, kaj tiu ŝia profunda sento maltrankviligis min.

Post kelkaj tagoj mia infano resaniĝis kaj forlasis la malsanulejon. Post tio mi kun tiu malgranda kolĉeno plurfoje serĉadis la virinon ĉe la strato kaj la vilaĝa enirejo. Falis en miajn okulojn miloj da vizaĝoj, sed ne aperis ŝia magra, tamen bela kaj afabla ovala vizaĝo. Mi povis nur enkestigi la kolĉenon kaj kun bedaŭro mi forlasis la hejmvilaĝon. . .

La virino radiis de ĝojo, dirante: "Kiel mi povus ne havi alian aspekton! Kiaj estis tiuj tagoj? Kaj



La sekvan tagon mi rimarkis tiun malgrandan sepstelan kolĉenon sub la kapkuseno de mia infano.

Ilustritaj de YAO SHOUXIN

kiaj estas la tagoj en la estanteco? Estas vero, ke la nuna politiko estas laŭ nia gusto!” Kaj ŝi elkorbigis iun grasan kokinon kaj insiste metis ĝin en mian korbon. Mi forte rifuzis, kaj ŝi malpacienĉigis: “Vi, vi tenas vin malintime al ni!” Kaj larmoj ruliĝis el ŝiaj okuloj. Mi povis nur akcepti ŝian komplezon kaj diris: “Ĉi-foje vi ja devas diri al mi, kio estas via nomo kaj en kiu vilaĝo vi loĝas. Mi certe vizitos vin en la Printempa Festo.” Mi tre bedaŭris, ke mi ne kunportis tiun sepstelan kolĉenon. Alie, mi ĝin redonus al ŝi. Mi petis ŝian pardonon. Tiumomente ŝi elprenis el sia poŝo geme brilantan kolĉenon pli belan ol la antaŭa. La helaj steloj, la brilaj drakoj kaj globoj pendis sur delikata kolĉeno el interplektitaj arĝentaj fadenoj.

“Verŝajne ĝi estas ĵus aĉetita,” mi diris.

“Jes, hodiaŭ mi kunportis kokojn kaj kameliflorojn, kaj pli ol duono jam estis vendita dumvoje. Mi do aĉetis ĝin, vidinte tie butikon de arĝentaĵoj!” ŝi rakontis kontente.

“Vi ja ne devis meti la kolĉenon sub la kapkusenon de mia filino tiutage!”

“Fine ni ĝisatendis la tagon longe spiratan. Ni estu ligitaj per feliĉo! Ho, sepstela kolĉeno, hodiaŭ mia infano portas vin, vin portas ankaŭ miaj bogepatroj. Hodiaŭ mi aĉetis novan por mi mem!” ŝia voĉo plenis de gajeco.

Ŝiaj vortoj emociis min ĝis larmoj. Mi ĝoje diris: “Franjo, sepstelaj kolĉenoj pendas sur niaj brustoj. La diligentaj naŝioj povas longe teni sian hodiaŭan riĉon, ili ankaŭ vidos la ĉarmon de la pli bela morgaŭo!”

** La aŭtoro estas 43-jara naŝio en Yunnan-provinco. Li estas membro de la Yunnan-a Filio de la Ĉina Verkista Asocio kaj laboras en la provinca Instituto pri Nacimalpli-multa Literaturo.*



BA HONG:

Fondiĝo de la sklavsystema ŝtato

REGNO KUN HEREDA TRONO DE XIA-DINASTIO

Pro la meritoj en jugo de akvego Yu, la ĉefo de la tribo Xia, ĝuis konfidon de sia popolo kaj la membroj de ĉiuj aliaj triboj, sekve li estis elektita kiel daŭriganto de la aferoj de Shun kaj funkciis kiel gvidanto de la tribo unuiĝo.

Sub la gvido de Yu disvolviĝis terkulturo kaj brutobredado. En la batalo kontraŭ aliaj triboj la tribo Xia gajnis venkojn unu post alia, kaptis multe da sklavoj kaj akiris multe da riĉaĵoj. Tiam Qi, la filo de Yu, jam rimarkinde potenciĝis. Li trovis, ke lia patro havas ne nur riĉan vivon, sed ankaŭ grandan potencon, tial Qi de longe deziris heredi tiun postenon. Ankaŭ plimulto de la sklavposedantoj-aristokratoj ne volis fordoni la potencon al la aliaj triboj. Post la morto de Yu, subtenate de la sklavposedantoj-aristokratoj de sia tribo, Qi abolis abdiĉecon, heredis la oficon de sia patro kaj fondis la unuan sklavsysteman ŝtaton en la ĉina historio, t.e. Xia-dinastio. Ekde tiam la sistemo de la “publika ŝtato”, en

kiu oni elektis eminentulon kiel sian ĉefon, cedis la lokon al tiu de la “hereda trono”, en kiu filo heredis la oficon de sia patro post ties morto aŭ frato transprenis tiun de sia pliĝa frato.

REPROSPERO EN LA REGPERIODO DE SHAO KANG

Surtroniĝinte, Qi koruptiĝis en sia vivo. Tuttage li drinkadis en la palaco kaj sin amuzadis. La diboĉado mallongigis lian vivon kaj baldaŭ li mortis. Tiam surtroniĝis lia plej aĝa filo Tai Kang, kiu koruptiĝis same kiel lia patro. Tio vekis publikan malamon.

Tiam en la oriento potenciĝis la gento Dongyi, kies ĉefo Houyi povis tre lerte sagopafi. Li gvidis trupojn kaj venkis la armeon komandatan de Tai Kang kaj funkciigis ties fraton Zhong Kang kiel marionetan reĝon, sed mem tenis la potencon. Poste lia sekvanto Han Zhuo mortigis lin kaj mem prenis la reĝan potencon.

La restintaj korteganoj de Xia-dinastio donis subtenon al Shao Kang, la nepo de Tai Kang,

kiu mortigis Han Zhuo kaj restarigis la regadon de Xia-dinastio.

Post centjara tumulto fine fondiĝis la nova sistemo de la "hereda trono". Tial oni nomis tiun ĉi historian periodon "Reprospero en la regperiodo de Shao Kang."

Kalkulate ekde Yu, Xia-dinastio, kiu daŭris kvarcent kelkdek jarojn, estis heredita sinsekve de 14 generacioj kaj regata de 17 reĝoj. Ĝia lasta reĝo estis Jie, fama tirano en la ĉina historio. Li estis diboĉema kaj kruelema. Sub lia regado la popolo ne povis sin vivteni kaj forte plendis kontraŭ li. La popolo malamis lin ĝisoste kaj ĵuris batali kontraŭ li ĝis la fino.

Tiam Tang, la ĉefo de Shang-tribo, iom post iom potenciĝis. Li preparis sin por pereigi Xia-dinastion jam de longe. Kaj tiam li profitante la okazon, gvidis siajn trupojn por militpuni la regantojn de Xia-dinastio, kies popolanoj varme akceptis la trupojn de Tang. Baldaŭ Jie malvenkis kaj mortis en Nanchao (sudoriente de la gubernio Shouxian en la nuna Anhui-provinco).

DISVOLVIĜO DE LA SKLAV-SISTEMO DE SHANG-DINASTIO

Laŭ legendo, antaŭ 4,000 jaroj la tribo Shang disvolviĝis ĉe la meza baseno de la Flava Rivero. La unua prapatro de Shang estis Qi, kiu helpis Yu dum lia jugo de akvego, kaj pro siaj elstaraj meritoj estis komisiita kiel ĉefo de Shang (nun gubernio Shangqiu, Henan-provinco).

De post Qi, la tribo Shang trapasis pli ol 400 jarojn kaj la tribestro de ĝia dek-kvara generacio estis Tang, lertulo, kiu foje-

refoje pligrandigis sian landon. Li aktivadis ĉe la malsupra kaj meza basenoj de la Flava Rivero, kaj iam eĉ atingis la bordon de Bohai-marĉo. Venkinte Jie, Tang establis Shang-dinastion, sed interne de ĝia kortego ofte okazis bataloj inter sklavposedantoj-aristokratoj por akiri la tronon. Tio daŭris 150 jarojn. Post kiam Pangeng, la dudeka reĝo de Shang-dinastio, heredis la tronon, por turniĝi el la stato de malordo kaj firmigi la regpotencon de la sklavsystema ŝtato li decidis preni Yin (nun Anyang-gubernio, Henan-provinco) kiel novan ĉefurbon (la antaŭa ĉefurbo estis Shang). De tiu tempo ĝis la pereado de Shang-dinastio, dum pli ol 270 jaroj, Yin ĉiam restis ĝia ĉefurbo. Tial historiistoj ankaŭ nomis Shang-dinastion Yin.

Post kiam Pangeng prenis Yin kiel novan ĉefurbon, lia regado fariĝis stabila, la politiko kaj ekonomio pluapase disvolviĝis, ĝia teritorio ampleksis preskaŭ la tuton de la nuna Henan-provinco kaj la grandan parton de la provincoj Shanxi, Shandong, Hebei, Shaanxi, Hubei kaj Anhui-provinco).

hui. Tial ĝi fariĝis granda sklavsystema lando, malofte vidita en la tiam mondo.

LA PLEJ FRUA SKRIBLINGVO DE ĈINIO

Ideografiaj gravuritaj sur ostoj aŭ testudaj ŝeloj estis la plej frua skriblingvo de Ĉinio. Oni unue trovis ilin en la fino de la 19-a jarcento en la vilaĝo Xiaotun de Anyang-gubernio, Henan-provinco. Ĝis hodiaŭ estas elterigitaj pli ol centmil pecoj, sur kiuj estas skribitaj preskaŭ kvinmil ideografiaj. La nuntempaj hanaj ideografiaj evoluis el tiaj gravuritaj ideografiaj dum miloj da jaroj.

La testudoŝelo aŭ bova skapolo servis kiel aŭguro en antikva Ĉinio. La regantoj de Shang-dinastio estis profunde superstiĉaj. Antaŭ ol trakti gravan aferon ili aŭguris sur osto aŭ testuda ŝelo. T.e. unue ebenigi per tranĉilo testudan ventran ŝelon aŭ skapolon de bovo, kaj due bori sur ĝia dorso. Dum aŭgurado oni bruligis en la truoj sur ĝia dorso, por ke ĝia antaŭo krevu kaj sur ĝi aperu interkruĉantaj fendoj. La aŭguristo

Shao Kang mortigis Han Zhuo kaj restarigis la regadon de Xia-dinastio.





En 1027 a. K. la reĝo Wu de Zhou-regno gvidis 3,000 bravulojn kaj 45,000 kirasulojn kaj ligiĝis kun 800 malgrandaj regnoj por militi kontraŭ la reĝo Zhou.

devis juĝi pri feliĉo aŭ malfeliĉo laŭ la formoj de la fendoj. Kaj fine li gravuris la aŭguraĵon per bronza tranĉilo sur testudan ŝelon aŭ bovan oston en formo de ideografiaĵoj.

El la granda nombro de la elterigitaj ideografiaĵoj oni povas rekoni multajn gravaĵojn de Shang-dinastio. Ekz. por subpremi sklavojn la sklavposedantoj konstruigis malliberejojn kaj praktikis kruelajn punojn kiel brulvundon, nazfortranĉon, entranĉon en la ventron ktp. Dum sakramenta ceremonio, krom buĉi bovojn kaj ŝafojn oni mortigis ankaŭ sklavojn unu aŭ kelkdekajn, iufoje, oni eĉ mortigis kvincent sklavojn. Cetere, la terekspluatado kaj plantado devis esti plenumataj de sklavoj. Ne tolerante la kruelan subpremadon, la sklavoj fuĝis grandnombre. Shang-dinastio ofte ba-

talis kontraŭ najbaraj triboj. Ĉiufoje ĝi sendis armitajn fortojn kun tri mil ĝis kvin mil homoj, iufoje kun 13 mil militistoj.

Per tiaj ideografiaĵoj oni notis ankaŭ specojn de agrokulturaj vegetaĵoj kiel rizo, tritiko, hordeo, milio kaj glumilio. Tiam oni prenis la lastajn du kiel ĉefmanĝaĵojn. Troviĝas ankaŭ multaj notoj pri vinofarado, kio montras, ke la tiama grenproduktado jam atingis tian nivelon ke oni povis uzi superfluan grenon por fari vinon.

Iam oni buĉis ĉirkaŭ mil bovojn por sakramenta ceremonio. Tio montras, ke la tiama brutbredado havis rimarkindan progreson.

Laŭ la noto de tiaj ideografiaĵoj la luna kalendaro jam distingis inter la monatoj grandaj kaj malgrandaj. La granda monato estas 30-taga kaj la malgranda — 29-taga. Post kelkaj jaroj oni aldonis superfluan monaton. Tiel la kalendaro jam preskaŭ egalas al la nuna ĉina kalendaro.

En la ideografiaĵoj estas troveblaj notoj pri suneklipso, luneklipso, steloj kaj verŝajne sunmakuloj, kiuj estas materialoj pri astronomio valoraj kaj la plej fruaj en la mondo. Kaj cetere en ili troviĝas ankaŭ notoj pri meteoroj, ĉasado kaj malsanoj.

ELEGANTAJ BRONZAJ UJOJ

La muldado de bronzaĵoj de Shang-dinastio estis la plej grava metiarta produktado kaj tute monopoligita de sklavposedantoj-aristokratoj. La metiarto de la bronzaĵoj havis sufiĉe altan nivelon. Tiam bronzo estis altvalora metalo, uzata ĉefe por produkti armilojn kaj vivbezonaĵojn, kiel ekzemple porcere-

moniajn ilojn, vinujojn kaj manĝilarojn. Inter multaj elegantaj bronzaĵoj troviĝas la granda kvadrata kuirvazo Simuwu, 875 kilogramojn peza, kaj kun delikataj desegnoj gravuritaj. Ĝia formo estas simpla, sed la procedo de muldado estis komplika kaj plene enkorpigis la diligentecon kaj saĝecon de la sklavoj de Shang-dinastio.

PEREO DE SHANG-DINASTIO

Zhou, la lasta reĝo de Shang-dinastio, estis ekstreme diboĉema kaj kruelema. Ĉu tage aŭ nokte, li furioze amuzis sin kaj drinkadis. Li eĉ ordonis gejunulojn kune ludi nudaj. Malŝparante sep jarojn, li konstruigis la imponan palacaron Lutai en Zhaoge (nun Qixian-gubernio, Henan-provinco), kio vekis senĉesan plendon de la popolo, baraktanta en la mizera vivo.


Por bremsi la publikan opinion kaj subpremi kontraŭstaron de la sklavoj, li praktikis diversspecajn kruelajn punojn. Unu el ili estis bruligi latunan kolonon ŝmiritan per oleo. Post kiam ĝi estis ardigita, li ordonis la punaton grimpi sur ĝin. Iuj korteganoj deadmonis lin fari tion kaj pro tio ili mem estis buĉitaj kaj dishakitaj. Vizaĝe al tio iuj gravaj korteganoj povis nur forfuĝi.

Tiam okcidente de Shang prosperiĝis tagon post tago Zhou-regno. Nemalmultaj regnoj, anstataŭ subiĝi al Shang, inkliniĝis al Zhou-regno kaj honoris la reĝon de Zhou kiel sian ĉefon.

En 1027 a.K. la reĝo Wu de Zhou-regno gvidis 3,000 bravulojn kaj 45,000 kirasulojn, unuiginte 800 malgrandajn regnojn por militpuno kontraŭ la tirano de Shang-dinastio. Ĉi tiu sendis



Ideografiaĵoj gravuritaj sur bova skapoĵo



Granda kuirvazo Simuwu de Shang-dinastio

170 mil soldatojn por batali kontraŭ la unuiĝintaj trupoj de la reĝo Wu en Muye (sude de la nuna Qixian-gubernio, Henan-

provinco). En la fronto granda nombro da sklavo-soldatoj de Shang-dinastio ribelis. Rimarkinte la ege malfavoran situa-

cion la tirano de Shang-dinastio sin bruligis ĉe Lutai, kio markis la pereon de Shang-dinastio, daŭrinta pli ol 600 jarojn.



ESPERANTO KAJ "FERBO-81"

FERBO-81 (Fervojistoj-Bologna-Jaro 1981) en Italio estas jam tradicia. Post la sukceso antaŭ du jaroj, "DOPOLAVORO FERROVIARIO-D.L.F." de Bolonjo denove prezentis al la ekstera publiko siajn aktivaĵojn.

Tio okazis per diversbranĉa ekspozicio, de la 5-a ĝis la 15-a de novembro, en salono en la centro de la urbo. Inter la diversaj branĉoj estis ankaŭ la Esperanta branĉo prezentita de la Esperantogrupo de DLF.

La elmonro konsistis ĉefe el tri partoj: Esperanto en la Fervojoj, Esperanto en la Turismo kaj


Esperanto en la Lernejoj kaj Junulara Vivo.

Super la Esperanta stando estis granda standardo kun la slogano: "Kontraŭ ĉiu lingva diskriminacio por forigi la miskomprenon inter la popoloj"; kiun italaj esperantistoj svingis en la centraj vojoj de Romo okaze de la surstrata manifestacio de la 52-a Itala Kongreso de Esperanto. En la Esp. ekspozicio havis la ĉefan rolon pluraj numeroj de

"El Popola Ĉinio", kiuj multe interesis la eksteran publikon.

En la Filatela Ekspozicio oni elmontris grandan kolekton de Esperantaj poŝtmarkoj kaj poŝtstampoj. Tiuj lastaj ĉiuj estis specialaj porokazaj poŝtstampoj uzitaj dum la Internaciaj Kongresoj de I.F.E.F.

La bildo montras s-ron Cavallini, respondeculon pri kulturo de D.L.F., vizitantan kun kolego s-ro Gimelli la Filatelan Ekspozicion.



Ankoraŭ ekzistas en la mondo diskriminacio kontraŭ virinoj

LA 34-a Plena Sesio de la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj aprobis en 1979 la "Konvencion pri Likvido de Ajna Formo de Diskriminacio kontraŭ Virinoj". Ĝi validiĝis ekde la 3-a de septembro 1981. La konvencio postulas, ke ĉiuj landoj starigu leĝon pri malpermeso de diskriminacio kontraŭ virinoj kaj efektivigu egalrajtecon inter la viroj kaj virinoj, alprenante specialajn rimedojn. La aprobo kaj validiĝo de la konvencio antaŭenpuŝos la centjaran movadon por la virinaj rajtoj kaj la virina liberiĝo en la mondo.

Tamen, en nemalmultaj landoj kaj regionoj ankoraŭ ekzistas diversgrade diskriminacio kontraŭ virinoj. En la leĝoj de multaj landoj estas difinite, ke la virinoj ĝuas egalrajtecon kun la viroj, sed fakte ne. Troviĝas ekzemple la fenomeno, ke la viroj kaj virinoj ne povas ricevi egalan pagon por egala laboro. Tio estas ofte vidata eĉ en la evoluintaj landoj. Laŭ informoj de la okcident-germana ĵurnalo Die Welt, la procento de la salajro de la oficistinoj kaj laboristinoj kontraŭ tiu de la oficistoj kaj laboristoj estas: 87% en Svedio; 86% en Italio; 77% en Francio; 75% en Nederlando; 72% en FRG; 70% en Britio; 68% en Svislando. En Usono, la meznombra salajro de la oficistinoj kaj laboristinoj en 1979 atingis nur 60%

de tiu de la oficistoj kaj laboristoj. En Japanio funkciis jam 30 jarojn la leĝo pri tio, ke la viroj kaj virinoj devas ricevi egalan pagon por egala laboro, sed fakte la diferenco de salajro inter la laborantoj kaj laborantinoj restas tre granda. En 1981 la salajro de la japanaj laboristinoj estis nur 50.3% de tiu de la laboristoj.

En la kapitalismaj landoj mastroj de la entreprenoj ĝenerale ne volas dungti virinojn, precipe studentinojn kaj neplenaĝajn virinojn. Estas des pli malfacile por virinoj havigi al si laboron en la landoj, kie kreskas subdungiĝo. En 1980 la proporcio de dungiteco de la usonaj virinoj atingis nur 52%. En Belgio en 1981 troviĝis 400 mil senlaboruloj, el kiuj 230 mil estis virinoj. Tial iuj virinoj estis devigitaj fari horpagan laboron, por kiu oni povas ricevi plej malaltan salajron. Estas raportite, ke nun en Japanio estas 2,560 mil virinoj, kiuj sin okupas pri horpaga laboro. En Italio 2,500 mil virinoj sin okupas pri "nigra laboro", kiu estas senkontrakta, malaltsalajra, sensekureca kaj aparte longtempa. Por la virinoj dungitaj ankaŭ estas ne facile konservi por si la laboron. Kiam venas ekonomia krizo, virinoj estas la unuaj, kiuj suferas de maldungo. Sekve oni diras, ke la laboristinoj kaj oficistinoj servas por la mastroj kiel "sekuriga valvo de prospero".

Alia ĝenerale videbla fenomeno de la diskriminacio kontraŭ la virinoj estas, ke la virinoj ne havas la rajton esti klerigitaj kiel la viroj. El la analfabetaro de la mondo ĉirkaŭ du trionoj estas virinoj. Tiu problemo aparte evidentiĝas en la disvolviĝantaj landoj. Ekzemple en Nord-Jemeno 90% de la virinoj estas analfabetoj. En regionoj, kie oni kutimas geedziĝi infanaĝe, knaboj edziĝintaj povas daŭre studi, sed knabinoj ne. Ili devas resti hejme por fari hejmlaboron. En Japanio, kvankam pli multaj virinoj estas klerigitaj, pliparto de la studentinoj tamen studas mastrumadon aŭ flegadon kaj tre malmultaj studas sciencon aŭ teknikon. Kaj grandparto de la antaŭaj devas resti hejme post la diplomitiĝo kaj servi al sia familio.

Edziniĝo kaj nasko estas gravaj faktoroj, kiuj malhelpas la virinojn gajni egalrajtecon. En Usono la virinoj en nemalmultaj entreprenoj batalakiris la rajton ripozi ses monatojn antaŭ kaj post sia akuŝo, sed sen salajro. Tamen en iuj aliaj entreprenoj oni ofte maldungas gravedajn virinojn. Pro timo al maldungiĝo iuj el ili devas kaŝi sian gravedecon kaj daŭre labori.

En la regionoj de la tria mondo, kie la ekonomio kaj kulturo estas relative postrestintaj, la virinoj estas katenitaj de

malnovaj kutimoj kaj moroj feŭ-
daj, religiaj kaj naciaj kaj tur-
mentataj kaj korpe kaj anime.
Infanaĝa geedziĝo ankoraŭ nun
furoras en iuj landoj. Infanaĝa
geedziĝo en Hindio estas antikva
moro, kiu, kvankam leĝe malper-
mesita, ankoraŭ videblas ne mal-

ofte en iuj regionoj, precipe en
vilaĝoj. Pro la infanaĝa geedzi-
ĝo la mortkvanto de la gravedaj
virinoj atingis 15 ĝis 30 procent-
tojn.

La neegaleco inter la viroj kaj
virinoj estas kompakte ligita kun
certa soci-sistemo kaj socia dis-

volviĝo. Nuntempe multaj landoj
staras por virinaj rajtoj, kaj an-
kaŭ aperis virinaj liberigaj mo-
vadoj kun malsamaj celoj. Ta-
men, por radikala likvido de
kontraŭvirina diskriminacio oni
devas iri ankoraŭ tre longan
vojon.



Pri la ĉina eduksistemo

LA ĉina edukado ampleksas kvar
nivelejojn: la antaŭlernejan, ele-
mentan, mezgradan kaj superan. La
antaŭlernejan edukon praktikas la
infanĝardenoj. La elementan edu-
kon praktikas la elementaj kaj vila-
ĝaj duonlaboraj lernejoj kaj klerigaj
grupoj por plenaĝuloj. La mezgra-
dan edukon praktikas la ordinara-
j, fakaj kaj por-plenaĝulaj mezlerne-
joj kaj la profesiaj kaj teknikaj lerne-
joj. La superan edukon praktikas
universitatoj, institutoj, superaj
kolegioj, esplor-institutoj kaj diver-
saspecaj superaj lernejoj por plen-
aĝuloj.

La infanĝardeno akceptas infanojn
de pli ol tri jaroj. Ĝenerale ekde sia
sepa jaro la infanoj rajtas viziti ele-
mentan lernejon, kie ili devas lerni
ses jarojn. La mezlernejo ampleksas
du stadiojn: La trijaran malaltan
kaj la trijaran altan. La lernotempoj
de la fakaj mezlernejoj estas dividi-
taj en du kategorioj — kvar jaroj
(parte tri aŭ kvin jaroj) por la
unuaj, kiuj prenas diplomitojn de
malaltaj mezlernejoj, kaj du aŭ tri
jaroj por la duaj, kiuj prenas diplo-
mitojn de la altaj mezlernejoj. La
profesiaj kaj teknikaj lernejoj pre-
nas diplomitojn de malaltaj mezler-
nejoj kaj la akceptitoj devas studi
tie tri jarojn. La studentoj studas
kvar jarojn, sed tiuj en medicinaj

institutoj kvin aŭ eĉ ses jarojn.
Lernantoj en la superaj kolegioj
studas du aŭ tri jarojn. La esplor-
institutoj ampleksas du stadiojn, t.e.
doktoriga kaj magistriga, kies lerno-
tempoj estas tri kaj du jaroj respek-
tive.

La superaj lernejoj prenas lernan-
tojn el la tuta lando. La Ministerio
pri Edukado preparas ekzamenajn
demandojn kaj starigas ekzamen-
ejojn en la administraj regionoj, kiuj
estas super gubernia nivelo. La
ekzamenoj okazas en la sama tempo,
kiun difinas la ŝtato. La provincaj,
municipaj kaj aŭtonom-regionaj aŭ-
toritatoj organizas instruistojn por
juĝi la respondojn kaj ĉi tiuj faras
notojn laŭ la normo. Fine la su-
peraj lernejoj prenas la pli elstarajn
homojn laŭ la deziro de la ekza-
menitoj kaj surbaze de iliaj kvali-
toj morala, intelekta kaj korpa.
Nur la artaj kaj sportaj institutoj
prenas lernantojn aparte de la aliaj
superaj lernejoj.

Nun la totala nombro de lernantoj
de ĉiuspecaj lernejoj estas ducent
kvar milionoj, inter kiuj estas 17,770
esplorantoj, 1,144,000 lernantoj de
superaj lernejoj, 55,080,000 mezler-
nejanoj kaj 146,270,000 lernantoj de
elementaj lernejoj. La instruistoj de
la superaj, mezaj kaj elementaj ler-

nejoj nombras sume 8,915,000.
Krome en Ĉinio troviĝas pli ol 290
surdamutulaj lernejoj kun 30,000
lernantoj.

En ĉiuj lernejoj oni kalkulas tem-
pon laŭ la lernojaroj, kiu konsistas
el du semestroj. La unua semestro
komenciĝas de la 1-a de septembro
kaj finiĝas en la lasta tagdeko de
januaro de la sekvanta jaro. La dua
semestro komenciĝas de februaro
kaj finiĝas en la dua aŭ tria tagdeko
de julio de la sama jaro. La somera
ferio ĝenerale daŭras ses semajnojn
dum la vintra daŭras kvar semaj-
nojn. En la plej intensaj sezonoj
de terkulturo la mezaj kaj elementaj
lernejoj en la kamparo donas semaj-
nan ferion, por ke la lernantoj povu
helpi la familion aŭ brigadon en
agrikultura laboro.

La ĉina registaro energie disvolvas
edukadon, kio ja celas elkulturon de
fizikaj kaj permensaj laborantoj,
morale, intelekte kaj korpe disvolvi-
ĝintaj kaj volonte servantaj al la
popolo kaj socialisma patrolando.





Kotona riĉrikolto en Tianmen-gubernio, Hubei-provinco — fama kotonproduktejo de Ĉinio



RIĈA RIKOLTO DE KOTONO

Ĝis la komenco de decembro 1981 Ĉinio aĉetis de kotonproduktaj regionoj 2,367,500 tunojn da kotono, je 17,500 tunoj pli multe ol la ŝtata plano kaj je 160,000 tunoj pli multe ol tiu aĉetita en 1980.

En 1981 nemalmultaj kotonkulturaj lokoj suferis de sekeco, inundo, tro frua prujno k.a. naturaj katastrofoj. Sed dank' al la klopodado de la kamparanoj, la malfaciloj estis venkitaj kaj la rikolto fariĝis kontentiga.

PRODUKTOKVANTO DE KARBO KAJ NAFTO DE ĈINIO EN 1981

En 1981 Ĉinio produktis sescent milionojn da tunoj da karbo, je 2% pli multe ol la ŝtata plano. Ankaŭ la ŝakta tunelado kaj karborafinado estis plenumitaj antaŭ la templimo de la ŝtata plano.

En la pasinta jaro Ĉinio produktis cent milionojn da tunoj da nafto. Kaj ĝia petrolindustria branĉo boris novajn oleputojn, kio kreis favorajn

kondiĉojn por pli granda produktopovo en 1982.

PLIAJ ELEKTRAJ GENERATOROJ EN 1981

En la pasinta jaro Ĉinio instalas en termo- kaj hidroelektrejoj novajn grandajn kaj mezgrandajn generatorojn kun totala kapacito de 1,873,000 kilovattoj. Dank' al tiuj novaj generatoroj la ŝtato superplenumis sian planon por konstrui novajn elektrejojn.


LA FLUO DE JANGZI-RIVERO ESTIS UNUAFOJE UZITA EN ELEKTROPRODUKTADO

En la fino de 1981 la du akvoturbinaj generatoroj plej frue muntitaj en elektrejo ĉe la akvoreguliga pivoto de Gezhouba komencis liveri elektron.

La kapacito de ĉiu el la du generatoroj estas 170 mil kilovattoj kaj ĉiujare povas produkti pli ol 1.8 miliardojn da kilovattthoroj da elektro, egale al energio de 540,000 tunoj da nafto aŭ 1,080,000 tunoj da karbo.

Tia generatoro projektita kaj produktita de Ĉinio mem estas unu el la plej grandaj specoj de generatoroj en la mondo uzablaj por diferenco de malalta akvonivelo. La ekspertiza komisiono el fakuloj de la koncernaj departementoj pri elektro-energio, akvomastrumado, maŝinkonstruado kaj trafiko konstatis en raporto, ke la du generatoroj funkcii bone kaj jam pretiĝis la kondiĉoj por oficiale liveri elektron.

Laboras granda karbo-transportilo de la karbominejo Xinglong en Yanzhou, Shandong-provinco.



KOMENCIĜIS KONSTRUADO DE LA DUA PERIODO DE LA AKVOREGULIGA PIVOTO DE GEZHOUBA

En la komenco de decembro 1981 komenciĝis la konstruado de la dua periodo de la akvoreguliga pivoto de Gezhouba. La laboro estis komencita per enigo de betono ĉe kanalo de la elektrejo Dajiang.

La konstruado de la dua periodo ampleksas la elektrejon Dajiang, kiu havas 14 generatorojn kun totala kapacito de 1.75 milionoj da kilovatoj, ŝipkluzon ebligantan trairon al ŝipoj de dek mil toneloj, ŝabloforlavan kluzon kaj ŝtonan digon ligitan kun la dekstra bordo. Dum la konstruado oni devas elfosi dek milionojn da kubmetroj da tero kaj ŝtono, enigi kvin milionojn da kubmetroj da betono kaj instalati metalajn blokojn kun totala pezo de 33 mil tunoj.

LA FLAVA RIVERO HELPAS TIANJIN

Estas fosita la kanalo kondukanta akvon de la Flava Rivero al Tianjin. La koncernaj provincoj Henan, Shandong kaj Hebei kaj urbo Tianjin liveris fortojn por tiu laboro.

En la tria tagdeko de oktobro 1981 la akvo de la Flava Rivero komencis flui al la soifa urbo Tianjin, kaj ĝis la komenco de decembro Tianjin ricevis pli ol 220 milionojn da kubmetroj da akvo.

ĈINIO DISVOLVOS KAMPANJON DE TUTPOPOLA DEVIGA ARBOPLANTADO

Por verdigi la landon kaj plibonigi la ekologian medion, la Kvara Sesio de la Kvina Tutlanda Popola Kongreso okazinta en la unua tagdeko de decembro 1981 proponis, ke escepte de maljunuloj, malfortuloj, malsanuloj kaj kripluloj, ĉiu civitano kun aĝo de pli ol 11

jaroj ĉiujare plantu laŭ lokaj kondiĉoj 3-5 arbojn aŭ faru laboron de arbidokulturado, arboflegado aŭ simila verdigo. La Ŝtata Konsilantaro ellaboros konkretajn rimedojn pri la arboplantado.

MA ZUGUANG TROVIS PROKSIM-INTRARUĜAN KONTINUAN SPEKTRON

Dum laborado en la Instituto pri Praktika Fiziko en la Universitato Hanovero, okcidenta Germanio, vicprofesoro Ma Zuguang de la Harbina Politekniko, Ĉinio, trovis proksim-infraruĝan kontinuan fluoreskan spektron.



Nun la radiofrekvencaj ondoj kaj grandpova proksim-infraruĝa lasero, uzataj en telekondukado, telekomunikado kaj cibernetiko, ne estas rezistemaj al interfero. Sciencistoj de Usono, okcidenta Germanio, Italio k.a. longe klopodis trovi laseran substancon povantan estigi proksim-infraruĝan kontinuan spektron por fari grandpovan kontinue frekvenc-modulan laseron. Ties spektra linio estus kontinue modulebla en difinita skalo de frekvencoj, kio altigus la kapablon kontraŭ interfero. Eksperimentado pruvis, ke lia eltrovo povas kontentigi la postulojn kaj havas grandan signifon en milita kaj civila uzado.

25 MONDAJ ĈAMPIONECOJ GAJNITAJ DE ĈINIO EN 1981

Ĉinaj sportistoj gajnis 25 mondajn ĉampionecojn kaj 280 orajn medalojn en internaciaj konkursoj en 1981.

1981 estis la jaro, en kiu pli da ĉinaj sportistoj partoprenis en mondaj konkursoj. Ili atingis bonajn sukcesojn en altnivelaj konkursoj de monda sfero, precipe en tiuj de tablotenis, virina flugpilkado, gimnastiko, pafado, ŝako, volanludo, plonĝo, arkopafo, halterlevo k.a.

Utiligo de Sunenergio



KOREKTO

por p. 36 de n-ro 10 de 1981

- L. (linio) 5, anstataŭ "Mureĝ" legu "Mureŝ".
- L. 9, anstataŭ "limsignoj" legu "limosignoj".
- L. 12, anstataŭ "Johaneton" legu "Johaneto".
- L. 6 de malsupre, anstataŭ "Pezajoj" legu "Poeziaĵoj".
- L. 12 de malsupre, anstataŭ "(1881 — 1928)" legu "(1881—1938)".



Nov-jorkaj junuloj lernas de Lei Feng

Por kontraŭi al la krimagadoj pli kaj pli furioziĝantaj, pli ol mil junuloj en Nov-Jorko, Usono, spon-

tanee sin organizis kaj "patronas la naŭ milionojn da urbanoj". Oni nomas ilin "patronoj".

Frumatene grupoj kaj grupoj da "patronoj" jam vigle staras ambaŭflanke de malĉefaj stratoj por projekti maljunulojn dum trapaso de "danĝera zono de krimagoj" kaj konduki infanojn dum transiro de strato. Kelkaj "patronoj" imponstaturaj kaj lertaj en boksarto sin kaŝas ĉe vojkruciĝoj por doni lecionon al krimfarantoj. Nokte, kiam oni profunde dormas, la "patronoj" kelkope patrolas ĉe vojkruciĝoj kaj subteraj fervojoj, kie plej ofte okazas krimagoj. Ili observas severan disciplinon.

Ĉiu el ili devas patroli du fojojn ĉiusemajne kaj kvar horojn ĉiufoje. Estas interese, ke tiuj "patronoj" deklaras, ke ili lernas de Lei Feng.* Ili ĉiuj portas ruĝan bereton sur la kapo, ruĝan brakbendon kaj T-forman subĉemizon, sur kiu troviĝas la vortoj "Lernu de Lei Feng". Iu usona junulo en tia vesto iam vizitis Ŝanhajon kaj aĉetis en Xinhua-librejo dekojn da ekzempleroj de la libro "Rakontoj pri Lei Feng" eldonita en la angla lingvo.

Speciala telefono

Antaŭ nelonge sur stratoj en Rio-de-Janeiro, Brazilo, aperis ia plasta budo pendanta sur fosto. Tiu 70 centimetrojn alta budo kun telefonaparato ene estas en formo de homa orelo. Sur la "orelego" legiĝas "telefono ekskluzive por handikapuloj".

Tiaj telefonoj estas speciale faritaj de la laborantoj en la Telefonkompanio de Rio-de-Janeiro kiel ilia kontribuo al la "Internacia Jaro de Handikapuloj". Ili estas muntitaj en malsanulejoj, sanatorioj, stratoj kaj aliaj publikaj lokoj. Tio ebligas al handikapuloj en sia rulseĝo telefoni sub tia budo, kiu ilin ŝirmas kontraŭ vento kaj pluvo. Laŭ plano la telefono-kompanio starigos tian telefonbudon tra la tuta ĉemara Suda Kvartalo.

ABONTARIFO DE "E.P.Ĉ."

Lando	Valuto	1 jaro	2 jaroj	3 jaroj
Aŭstralio	\$A	5.70	9.60	14.40
Aŭstrio	Sch	81.60	136.00	204.00
Belgio	BF	180.00	300.00	450.00
FR Germanio	DM	10.80	18.00	27.00
Britio	£	3.00	5.00	7.50
Finnlando	FMK	24.00	40.00	60.00
Francio	FF	26.40	44.00	66.00
Italio	Lit	5280	8800	13200
Japanio	Yen	1400	2800	4000
Jugoslavio	Din.	150	250	370
Nederlando	Gld.	12.60	21.00	31.50
Nov-Zelando	NZ\$	6.70	11.20	16.80
Svisio	SF	10.50	17.60	26.40
Usono	US\$	6.00	10.00	15.00
Kanado	Can\$	7.20	12.00	18.00

* * *

Por aliaj landoj en Eŭropo:

£	3.00	5.00	7.50
US\$	6.00	10.00	15.00

Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:

£	2.20	3.60	5.40
US\$	4.30	7.20	10.80

Butiko por maldekstruloj

En San-Paŭlo, Brazilo, troviĝas Butiko por Maldekstruloj, kiu ekskluzive vendas ĉiutagajn bezonaĵojn por la maldekstruloj. Estas ŝatataj de la klientoj la tondilo por maldeks-

tra mano, la liniilo gradigita de dekstro al maldekstro, la infanludiĵoj manipolataj per maldekstra mano k.a. Oni diras, ke dekonono de la brazilanoj estas maldekstruloj. Funkciigi la butikon por maldekstruloj signifas doni faciligon al la 13 milionoj da maldekstruloj en Brazilo. Nun ekzistas pluraj entreprenoj, kiuj produktas bezonaĵojn por maldekstruloj. Tiaj butikoj jam antaŭ longe aperis en Eŭropo kaj Usono, sed en Latin-Ameriko la afero estas tute nova. Estas menciinde, ke la direktoroj de tiuj entreprenoj kaj la mastro de tiu butikoj ĉiuj estas maldekstruloj, tial ili bone scias la bezonojn de tiaj homoj.

** Lei Feng estis soldato de la Ĉina Popola Liberiga Armeo. Li ĉiam volontis helpi aliajn kaj estas bona modelo, lernata de la ĉinaj gejunuloj.*



(Daŭrigo de p. 27)

pli ol 60 membroj de la trupo devis provludi interpremiĝe en ĉambro kun plankareo de 30 kvadrataj metroj. Pro manko de spaco iuj eĉ devis stari ekster la pordo. Malgraŭ la malbonaj kondiĉoj, ili ĉiam havas bonan humoron. Iuj membroj post malsaniĝo ankoraŭ partoprenis la aktivadon. Kiam difektiĝis muzikaj stabloj aŭ seĝoj, iuj membroj ilin riparitis senbrue. Foje la timbalo difektiĝis kaj kelkaj junuloj riparitis ĝin dum

unu vespero, per tio ili ŝparis cent juanojn por la trupo.

La filharmonio faris enketon pri la demando "Kiel bone funkciigi la trupon?" 22-jara aldisto Lin Li emocie prezentis sian opinion. Li skribis jene: "La latentata forto de nia filharmonio estas granda. Se ni unuanime klopodos, post kelkaj jaroj nia trupo fariĝos perfekta simfonia orkestro, kun ĉambromuzika grupo, kordinstrumenta kunluda grupo, blov- kaj kordinstrumenta kunluda grupo k.a., kiu povos ludi simfoniajn verkojn pli mal-

facilajn kaj niaj membroj havos bonajn kostumojn. . ." Kiel bela revo estas! Kun varma entuziasmo ili certe atingos tiun celon. Ili nun sin preparas por fondi alian grupon de tradiciaj muzikiloj kun nacia stilo.

Iun tagon, kiam mi venis al provludejo de la filharmonio, ili estis en provludo de "La Kvina Simfonio" de Betoveno. El ilia serioza ludado kaj absorbita esprimo de iliaj vizaĝoj mi kredas, ke ili estas fortuloj antaŭ sia sorto kaj ilia idealo certe estos realigita.

KIEL FARI ABONON DE "E.P.Ĉ."

1. Sendu la plenigitan abonilon kune kun via abonpago al iu nia peranto en via lando. Oni ankaŭ povas fari la abonon rekte ĉe Esperanta Sekcio de Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj (GUOJI SHUDIAN). Tiukaze bonvolu pagi al ni per unu el jenaj rimedoj:
 - a. per ĉeko, mandato aŭ egal-valoraj internaciaj respondokuponoj rekte al ni;
 - b. pere de vialoka banko al Banko de Ĉinio en Beijing por Esperanta Sekcio de Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj (GUOJI SHUDIAN);
 - c. pere de vialoka banko al la konto de GUOJI SHUDLAN No.137286-00 en Bank of China, 8/10 Mansion House Place, London EC4N 8BL, Anglio.
2. Se vi bezonos fari reklamacion aŭ adresosangon post via enaboniĝo, tiam bonvolu turni vin rekte al la Esperanta Sekcio de Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj kun kopio de via adresetikedo detranĉita de la EPĈ-koverta, kaj tiamaniere ni povos plenumi vian peton akurate.
3. Se vi jam faris vian abonon ĉe la peranto, ne sendu la abonilon al ni samtempe! Alie ni mis-komprenos vian intencion kaj duoble plenumos vian enaboniĝon.

ATENTU: ĉiam kun noto ke vi pagas "Por Esperanta Sekcio"!

Esperanta Sekcio de Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj
(GUOZI SHUDIAN)



P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

(Parta listo de niaj perantoj troviĝas en n-ro 1 de EPĈ, 1982)

HUMURAJŔO DE LA
ANTIKVA ĈINIO


Ŝtelado de
kapro

- 1 Iu virino ŝtelis kapron de najbaro.
- 2 Ŝi kaŝis la kapron sub la lito kaj avertis sian filon, ke li ne diru tion al aliaj.
- 3 Rimarkinte, ke la kapro perdiĝis, la najbaro ekblasfemis surstrate.
- 4 La filo diris al la najbaro: "Mia panjo ne ŝtelis vian kapron."
- 5 La virino forte maltrankviliĝis kaj kolere rigardadis lin per larĝe malfermitaj okuloj.
- 6 La filo denove diris al la najbaro: "Rigardu la okulojn de mia panjo, ili vere similas al tiuj de la kapro kaŝita sub nia lito."



Pentritaj de WEI ZHENZHONG


LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO



1. Pekino
2. Nankino
3. Sanhajo
4. Kantono
5. Qingdao
6. Chongqing
7. Yan'an
8. Jinyun
9. Taishan-monto
10. Qufu
11. La Granda Xing'an-montaro
12. Lancang-gubernio
13. Xi'an

Ĉinaj akrobataĵoj

Fotoj de WANG SHOULIANG





Korpofleksado sur
taburetoj



Akrobatoj piede ludas
ombrelojn.

Korpofleksado





LA ANTIKVA
ĈEFURBO XI'AN


(3)


NOVA FIZIONOMIO DE XI'AN



Kun la disvolvigo de socialisma konstruado, Xi'an turnigis el konsumata urbo en la plej grandan industrian urbon en la nordokcidenta parto de Ĉinio. Ĝia areo dekoble pligrandigis kompare kun tiu en la komenco de la 50-aj jaroj, kaj 6.6-oble kreskis la plank-areo de la domoj. En la orienta antaŭurbo aperis tekstila urbo kun areo de 2.5 kvadrataj kilometroj, kies monata produktokvanto de kotonaj ŝtofo kaj fa-

Spinejo de tekstila fabriko
Foto de ZHU YONGQING





Laborejo de transformatora fabriko

Foto de RU SUICHU

Infana ludejo en Xingqing-parko


Foto de LAO BAI



deno superis la jaran produktokvanton de tiuj de Shaanxi-provinco en la malnova Ĉinio. En la okcidenta antaŭurbo formiĝis elektr-industria urbo kun areo de 5 kvadrataj kilometroj, kie funkcias dek elektramaŝinaj fabrikoj, naŭ institutoj kaj ties dependaj edukaj, kulturaj, higienaj kaj porvivaj servoj. Tie la pitoreskaj lokoj Huaqing-lago kaj Xingqing-palaco post riparo altiras al si vizitantojn.

Huaqing-lago

Foto de LAO BAI



Nove konstruita kvartalo

Foto de RU SUICHU

